

junio 1971
64-a jaro
n-ro 787 (6)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Prof. Lapenna en Finnlando: p. 103

Vi trovos

unue la raporton de la estrara kunsido, kvankam ne ordigitan, kaj la artikolojn pri la agado de la UEA-prezidanto en Finnlando, pri la litova influo al Esperanto, pri la Esperanta sporta lingvo, kiuj sendube interesos la vastan plimulton de nia legantaro. Krome vi trovos la oficialan jarraporton de Instituto Hodler '68 pri la pasinta jaro. Kompense al tio, ke UEA ne plu eldonos la gazeton "La praktiko", kion vi ja legos en la oficiala informilo, la Estraro decidis, ke ekde la juli-aŭgusta numero, "Esperanto" enhavu unu-paĝan rubrikon ĉefe por komencantoj kun amuzaj kaj instruaj legaĵoj. (Ĝia provizore decidita titolo estas: "Komenco bona — ĉio bona".) Ankaŭ por tiu rubriko ni atendas de la legantaro bonajn kontribuaĵojn...

Enhavo

- 101 Kion diskutis la Estraro? — Punktoj el la aprila kunsido
- 102 Pliaj paĝoj en Kubo
- 102 TV-kurso ekde januaro — Nederlando
- 102 Evoluanta informado en Pollando
- 103 Prezidanto de UEA prelegis en Esperanto pri fakaj temoj en Finnlando (Ahomäki)
- 104 Ĉu la litova lingvo influis Esperanton? (Trunte/Poška)
- 106 Recenzoj
- 107 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj)
- 108 Informoj de CED
- 109 Sporta lingvo (Ujlaky-Nagy)
- 112 Por pli efika informado (6): Sekteco (Lapenna)
- 113 56-a Universala Kongreso, Londono, aŭgusto 1971
- 114 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 116 "Pasporto" renovigita (TEJO-paĝo)
- 116 Nekrologoj: Bokarev, Bonesper, Holness, Luplau, Somlai
- 117 En kiu lingvo estas skribita la suba teksto?
- 117 Esperanto en radio
- 118 Instituto Hodler '68 — Ekstraktoj el la jarraporto 1970
- 118 Oficiala informilo: n-ro 446
- 119 Informejo
- 120 Anoncetoj

La kovrilo

En la informado efike agadi estas vere malfacile. Kelkfoje homoj rapide konkludas, ke estus pli bone nenion fari, ol fari fuŝe. Por la prelegvojaĝo de prof-o Ivo Lapenna (maldekstre) en Finnlando estis bone harmoniantaj kunlaboroj inter lokaj esperantistoj kaj bone zorgataj preparoj fare de la organizantoj, inter kiuj s-ro Harri Melasniemi (dekstre), ankaŭ kiel fakdelegito pri reklamado en Turku, efike kontaktis kun la gazetaro kaj radiostacioj. La foto estas farita en Radio Turku, kiu tutlande elsendis programeron intervjuan kun prof-o Lapenna. Interkrampe ni menciui, ke fone de la sukcesa prelegvojaĝo estis perfekta interpretado de Esperanto al la finna lingvo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910). Ĉefredaktoro: V. Sadler. Redaktoro: f-ino A. Nagata. Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo). Aperas monate (escepte de aŭgusto). Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Aŭstralio, Nov-Zel-do 13,75; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Uson., Meks. 5,50; Isr. 2,75 gld. Anonc-tarifo: 1 p. 285 gld., 1/2 p. 150 gld., 1/4 p. 85 gld., 1/8 p. 50 gld. 1/16 p. 35 gld. Ripet-rabato 20%. Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001. Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA). Telefono: (010) 36 15 39. Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM. Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA. Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando. Legantoj en 89 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo. Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando. Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo. Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.G. Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: U.J. Moritz, D-511 Alsdorf. Blumenstr. 7, F.R. Germanujo. Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris 17^e, Francujo. Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonaĵoj: J. Uśpieński, Poŝtkesto 100, Warszawa-12, Polujo. Estrarano pri financoj kaj administrado: E.J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

KION DISKUTIS LA ESTRARO?

— Punktoj el la aprila kunsido

La 8-persona Estraro de UEA havis sian laŭstatutan ĉiujaran kunsidon en la Centra Oficejo en Rotterdam de la 16-a ĝis la 18-a de aprilo ĉi-jare. Ĉeestis ĉiuj estraranoj, la direktoro de la C.O. kaj (parte) la KKS kaj librotenistino. La tagordo de la tritaga kunsido estis tiel ampleksa, ke ni povas raporti ĉi tie nur telegramstile pri la ĉefaj punktoj diskutitaj.

Financa perspektivo

- La financa jaro 1970 finiĝis per deficito de ĉ. 18 600 guldenoj. (En 1969 la deficito estis 42 200 gld.) La jaro 1970 estis transira periodo, dum kiu la Centra Oficejo komencis iom post iom transpreni parton de la preslaboroj por la asociaj organoj. La ŝparoj, kiujn tio ebligas (taksitaj je pli ol 50 000 guldenoj), aperos plene nur en la nuna jaro 1971.
- Malgraŭ la deficito, la financa stato de UEA estas baze solida, kaj la sumo de la fondaĵoj kaj asocia kapitalo en la fino de 1970 estis preskaŭ sensanĝa: 263 600 gld.
- La Estraro akceptis reviziitan buĝetproponon por la nuna jaro 1971 kaj unuan buĝetproponon por 1972. Por 1971 necesis revizii la buĝeton precipe pro la gravaj altigoj de afrank-tarifoj kaj pro ŝtate devigitaj altigoj de salajroj kaj asekuroj.
- Laŭ la perspektiva plano pri la evoluigo de grafikaj laboroj en la C.O., la malnetaj enspezoj pro preslaboroj por eksteraj mendantoj devas kreski de 2 400 en 1970 al 8 900 en 1971 kaj 31 600 en 1972. En la kadro de tiu plano la Estraro jam aprobis la aĉeton de dua kompostmaŝino — investo de ĉ. 20 000 gld.
- La revuo de CED *La Monda Lingvo-Problemo* havis deficiton en la abonjaro 1970, pagitan parte el mono speciale kolektita por tiu celo, parte el la Propaganda Konto. La Estraro tamen opinias tiun revuon tiel grava, ke necesas elporti tiun financon ŝarĝon almenaŭ du pliajn jarojn. (Baldaŭ komenciĝos nova kampanjo por varbi abonojn ĉe bibliotekoj k.s.)
- La Estraro notis kun kontento kaj danko la raporton de Institucio Hodler 68 (vidu sur p. 118).
- UEA organizos novan kampanjon por kolekti subskribojn de parlamentanoj kaj registaranoj por la Propono al UN, kun la celo disponi skriban pruvon pri la apogo al Esperanto en tiuj medioj, utiligeblan en okazoj de novaj klopodoj sur landa aŭ internacia nivelo.
- La Estraro baldaŭ turnos sin per nacilingvaj cirkuleraĵoj leteroj al elektitaj subskribintoj de la Propono al Unuiĝintaj Nacioj, prezentita al UN en 1966. La cirkulero informos la subskribintojn pri la posta sorto de la Propono, precipe la ĝis nun negativa sinteno de la Sekretariato de UN, kaj instigos ilin aboni

la revuon *La Monda Lingvo-Problemo*, lerni mem Esperanton aŭ finance kontribui al la Esperanto-movado.

- Baldaŭ estos disponebla duonhora kolorfilmo pri la Universala Kongreso de Vieno.
- La Estraro pridiskutis projekton de novaj rilatoj inter UEA kaj la junulara sekcio TEJO. La projekto baziĝas sur pli granda integriĝo de ambaŭ. La financa ĵaro por TEJO finiĝis pli bone, ol la antaŭaj, kaj TEJO povis iom malaltigi siajn ŝuldojn.

Pri la eldonaĵoj de UEA

- En unu el la venontaj monatoj, ĉiuj membroj-abonantoj de UEA en transpagipovaj landoj ricevos, anstataŭ la kutima unu ekzemplero de la revuo *Esperanto*, DU ekzemplerojn! Tio estos parto de nova varbo-kampanjo, kaj ĉiuj membroj estos petitaj uzi la ekstran ekzempleron por varbi novan membron aŭ por abonigi lokan bibliotekon. La necesa varbilo estos aldonita al la specimeno.
- La lastaj eldonaĵoj de UEA/CED vendiĝas kontentige: jam vendiĝis ĉ. 40% de la eldonkvanto de *Pri internacia lingvo — dum jarcentoj* (dec. 1970) kaj 70% de la kvanto de *Ĉarto de UN* (jul. 1970).
- La Estraro akceptis la verkon *Neĝa lando* de la japana nobelpremiito Kawabata Yasunari, eldonotan ĉi-jare de Japana Esperanto-Instituto, en la serion *Oriento-Okcidento*.
- La Estraro principe decidis, ke UEA rekomencos la eldonadon de la konataj "Ŝlosiloj de Esperanto" en diversaj lingvoj laŭbezono.
- Preskaŭ la tuta manuskripto jam estas preta por la dua eldono de la verko *La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto*. La unua eldono aperis en 1954 kiel eldonaĵo de CED, sed la nova estas komplete reverkita kaj multe pli ampleksa.
- UEA akceptis antaŭmendi 500 ekzemplerojn de la tria volumo de *Plena Gramatiko*, kiun eldonos privata eldonejo en Italujo. Sen tiu antaŭmendo la tria volumo ne povus aperi. Multaj jam posedas la unuan kaj duan volumojn kaj sentas mankon de la tria.
- Post konsidero de pluraj proponoj la Estraro atingis principajn decidojn pri la kongresurboj por la jaroj 1973, 1974 kaj 1975. La definitivaj elektoj tamen ankoraŭ dependas de diversaj faktoroj, kaj oficiala informo aperos nur kiam la decidoj estos certaj.
- En preparo estas ankaŭ manlibreto por aktivuloj en la informado pri Esperanto, kun artikoloj de prof. Lapenna kaj aliaj.
- La Estraro aprobis proponon pri starigo de Scienca Tradukservo, kun la celo kolekti kaj disponigi Esperantajn tradukojn de sciencaj artikoloj.
- La Estraro krome kunsidis kun s-ro Schippers, respondeculo de FEN pri la nederlanda televida kurso de Esperanto, por informiĝi kaj konsili pri la tiurilataj planoj.
- En 1972, de la 10-a ĝis la 16-a de julio, okazos Hungara Kultura Festivalo en Budapeŝto, sub aŭspicio de UEA.
- Fine, la Estraro pritraktis kaj definitivigis la tekston de la Estrara Raporto pri 1970/71, aperonta en la Dua Parto de la Jarlibro 1971.



En la lando Kubo, en kiu loĝas proksimume 8 milionoj da homoj kaj estas parolata la hispana kiel la oficiala, la Internacia Lingvo Esperanto estas vere utiligota per la manoj de oficialuloj.

Sekve de la fondo de la Komisiono de la Lingvo Esperanto fare de la Ministerio pri Edukado de Kubo (vd.: *Esperanto*, novembro 1970, p. 162) kaj sekve de la esplorado pri Esperanto fare de la Komisiono, la Ministerio pri Edukado lastatempe sendis al la peranto de UEA en Kubo s-ro Pedro P. Lamas Díaz komunikon pri novaj paŝoj per Esperanto.

Laŭ ĝi, la kuba registaro nun planas eldoni en la Internacia Lingvo la jenajn librojn:

“La historio absolvos min”, de Fidel Castro.

“Simplaj versoj”, de José Martí.

“Taglibro de Ché en Bolivio”, de Che Guevara.

“Dua Deklaracio de La Habana”.

Krome la registaro eldonos politikan revuon en Esperanto.

Alia nova paŝo estas, ke oni fondos oficialan organizaĵon “Internacia Socialisma Instituto de Esperanto”. Se tio efektiviĝos, ĝi fariĝos la unua landskala (aŭ, internaciskala?) organizaĵo en Kubo.

TV-KURSO EKDE JANUARO — Nederlando

La televida Esperanto-kurso de la institucio Teleac komenciĝos en la nederlanda televido en januaro venonta. Tion jam firme anoncis Teleac. La ĉefaj aktoroj de la kurso estos du konataj nederlandaj komediistoj, Kees van Kooten kaj Wim de Bie, kiuj nun studas la lingvon speciale por tiu celo. Ilia foto kun okulfrapa informo pri la kurso jam aperis en aprilo en ĉiuj gravaj nederlandaj gazetoj.

Nova provo per komediistoj

En la pasinteco, Teleac ĉiam elektis interalie allogan virinon kiel aktorinon de la kursoj (hispana, franca

k.a.), sed nun per la elekto de la du komediistoj ĝi volas provi novan allogilon por la TV-publiko. Malgraŭ la komediaj nuancoj, la enhavo de la kurso ne estos malpli serioza, ol tiu de la antaŭaj.

Tiel kulminos la longedaŭraj intertraktadoj inter Teleac kaj FEN (Federacio de Esperanto-Organizoj en Nederlando) kaj la longa ellaborado de la baza kursmaterialo. Samtempe tamen komenciĝos la vera defio al la nederlanda Esperanto-movado: ĉu ĝi kapablas reteni la interesiĝon de la TV-spektantoj, havigi daŭrigan instruadon al la novaj kursanoj kaj fine ebligi al ili praktikan utiligon de la novakirita scio? Ekzistas espero, ke ĝustatempe aperos nova Esperanto-vortaro nederlanda, kaj FEN planas la eldonon de speciala gazeto por la TV-kursanoj. Daŭriga koresponda kurso kaj specialaj kulturaj aranĝoj estas ankaŭ konsiderataj.

Spektebla ankaŭ per kolora televido

La bazan instrumaterialon por la kurso preparis FEN, sed ĝi estas nun aliformigata por konformiĝi al la stilo kaj ideoj de la du komediistoj. Ili mem verkas diversajn skeĉojn por ilustrati la materialon. En la komenco, ekzemple, la du sinjoroj renkontiĝos kiel diversnaciaj, duondronintaj viktimoj de ŝiprompiĝo, alpuŝitaj de la maro sur senhoman insuleton.

La tuta kurso, sub reĝisorado de Jop Pannekoek, konsistos el ĉirkaŭ 20 duonhoraj lecionoj, el kiuj ĉiu prezentiĝos dufoje en la semajno. Aparta enkonduka aŭ reklama leciono estos elsendita en decembro. La kurso estos spektebla tiel per nigra-blanka kiel ankaŭ per kolora televido. Ĉiu leciono cetere konsistos el tri partoj: la unuan prezentos la profesiaj aktoroj, en la dua aperos ankaŭ esperantistoj, dum la tria parto estos nura ripetado de la instruaĵo.

Evoluanta informado en Pollando

Pola Esperanto-Asocio disvolvis lastatempe landskalan informadon pri Esperanto en la gazetaro. Du fojojn monate estas dissendataj al proksimume 150 ĵurnaloj kaj semajnevuo bultenoj de la Gazetara Servo de PEA, gvidata de red. Andrzej Pettyn el Pola Radio.

Krom informoj kaj interesaĵoj pri Esperanto aŭ en ligo kun Esperanto oni ankaŭ dissendas pretajn artikolojn aŭ intervjuojn koncerne al Esperanto kaj la lingva problemo. Rezulte de tiu ĉi pliintensigita informado en februaro komencis alvenadi al la oficejo de PEA en Varsovio multaj leteroj kun demandoj pri Esperanto, membriĝo al PEA, korespondaj kursoj, lernolibroj, vortaroj ktp. Dum la tuta februaro PEA ricevadis ĉiutage meznombro 150 tiajn leterojn. Entute PEA ricevis dum kvin semajnoj 5 227 demandojn pri Esperanto.

Prezidanto de UEA prelegis en Esperanto pri fakaj temoj en Finnlando



S-ro J. Ahomäki, unu el la organizantoj de la prelegvojaĝo, interpretis por prof-o Lapenna dum unu el la gazetaraj konferencoj.

Laŭ la invito de la universitatoj de Turku, Tampere kaj Jyväskylä, profesoro d-ro Ivo Lapenna el Londono faris fakan prelegviziton en Finnlando de la 27-a de marto ĝis la 6-a de aprilo 1971. La temoj de liaj prelegoj estis: "Internacijuraj problemoj de spacveturado", "Jura kaj morala signifo de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj", "La lingva problemo en la internaciaj rilatoj", "La protekto de aŭtoraj rajtoj kun aparta konsidero al la Universala Konvencio de Unesko" kaj "Bazaj principoj de la soveta kaj jugoslavia konstitucioj". Ĉiuj prelegoj estis prezentitaj en la Internacia Lingvo Esperanto kaj interpretitaj en la finnan lingvon. Tiu fakto, ke konata eksterlanda fakulo prelegas en Esperanto, estis el informa vidpunkto tre grava, precipe inter universitataj studentoj kaj profesoroj ekster nia movado.

Trafaj argumentoj kaj elokventa oratoreco

Estis interese observi la efikan kaj fruktodonan agadon de profesoro Lapenna de proksime. Jam la unua gazetara konferenco aranĝita en Turku tuj post la alveno de nia estimata gasto fariĝis pli granda sukceso, ol oni atendis. Ekestis ioma embaraso, ĉar redaktoroj en la loka radiostacio jam atendis, sed aliflanke ne estis eble fini la gazetaran konferencon pro tio, ke la reprezentantoj de la lokaj kaj tutlandaj gazetoj havis daŭre novajn kaj ree novajn demandojn al prof. Lapenna. Forirante ili kore dankis kaj diris, ke nur malofte oni havas eblecon intervui tiel interesan personecon. Tiu bona atmosfero donis ankaŭ rezultojn, kiujn ni povis legi la sekvintan tagon.

Senlace profesoro Lapenna respondis al ĉiuj faritaj demandoj kaj en gazetaraj konferencoj kaj post prelegoj en la universitatoj. Trafaj argumentoj kaj elokventa oratoreco inspiris aŭskultantojn por fari interesajn, gravajn demandojn. Post la prelegoj la publiko donis fortajn aplaŭdojn, kiuj ne estas kutimaj en universitataj medioj en Finnlando. Ĉe lunĉoj kaj kafotabloj spritaj anekdotoj spicis konversaciojn kun universitataj gekolegoj. Ĉiam la prezidanto de UEA trovis saĝan kaj lerte formulitan respondon favoran al Esperanto, eĉ kiam temis pri sufiĉe komplikaj kaj malfacilaj demandoj.

Pri la vizito skribis la plej gravaj gazetoj de Finnlando: i.a. *Helsingin sanomat*, *Aamulehti*, *Turun sanomat* kaj *Uusi Suomi*. Radio raportis pri la vizito kaj en lokaj kaj en tutlandaj elsendoj. En la Universitata Biblioteko de Turku okazis ekspozicio de Esperanta literaturo. En Helsinko profesoro Lapenna prelegis en la Societo de Unuiĝintaj Nacioj. Informa agado en la kadro de la vizito donis rimarkindan rezulton. Ni menciuj, ke en du gazetoj la intervjuoj estis 5-kolumnaj kaj en *Aamulehti* aperis 6-kolumna raporto kun granda foto.

Kunlaboro de lokaj aranĝantoj

En la kastelo de Turku, 800-jara historia monumento, profesoro Lapenna faris festparoladon okaze de la dekjara jubileo de la loka societo. Iuj gastoj malproksimaj ankaŭ ĉeestis kaj ili ricevis rekompencojn pro longa vojaĝo per brila, vera artverko — la festparolado, kiu fariĝis neforgesebla sperto kaj travivaĵo.

Ni estas tre dankaj, ke profesoro Lapenna oferis parton de sia ferio por prelegvizito en Finnlando. Estis tre agrable kunlabori, ĉar li alte aprezis ankaŭ la penadon de la lokaj aranĝantoj. Sincere dirite, ni iom timis eventualajn problemojn koncerne tian prelegviziton, ekzemple interpretadon kaj aliajn similajn malfacilaĵojn, sed per siaj ĉarma bonhumoro kaj afableco tuj ekde la komenco li forigis niajn dubemon kaj timon kaj konkere venkis kaj kaptis nin ĉiujn.

Rapide forflugis la tagoj de la vizito, sed inspira, neforgesebla sperto longe restos en nia memoro. Fine ni deziras direkti niajn amikajn dankojn al ĉiuj, kiuj kontribuis por la sukceso de la aranĝoj. Ne estas eble menciuj nomojn, ĉar ni havis tre multajn kunlaborantojn, sed estu ili ĉiuj certaj, ke ni ne forgesos ilian gravan, neanstataŭigeblan helpon.

Espereble la vizito de profesoro Lapenna en malproksima Nordo, en la lando de Väinämöinen kaj Kalevala, donis ankaŭ al li mem fortan senton pri tio, ke ni deziras harmonie kunlabori kaj subteni lian valoran, sindonan agadon por la sukceso de nia movado.

Jorma Ahomäki, sekretario
Esperanto-Asocio de Finnlando

ĈU LA LITOVA LINGVO INFLUIS

La litova lingvo estas membro de la latva familio de la hind-eŭropaj lingvoj. Kvankam ĝi havas skriban literaturon jam de la 16-a jarcento post Kristo, ĝia influo restis malgranda pro la malgrandeco de la litova popolo: eble 3 milionoj da litovlingvanoj entute. Kurioze, do, ke ĝuste tia lingvo povis havi, pro hazardaj historiaj kaŭzoj, influon en la formiĝo de la Internacia Lingvo. Ĉu vere Zamenhof utiligis la ekzemplojn de la litova lingvo en la planado de la Internacia? Kiu legos la zorge ellaboritan studon de la juna esperantologo Hartmut Trunte, tiu povos juĝi mem. Eble la fina verdikto ne multe gravas por la estanteco kaj estonteco de Esperanto, sed por tiuj kun koro de filologo la ĉasado laŭ malnovaj spuroj estas rava sporto....

Estas sufiĉe bone konate, ke la fontoj de la vortaro de Esperanto estas la lingvoj latina, franca, angla kaj germana, malpli la rusa, pola, itala, ĉe nur kelkaj vortoj la malnovgreka kaj la jida ĉe la radiko *edz'in'*. Tamen ekzistas almenaŭ unu alia sufiĉe grava fontlingvo, ĝis nun ne sufiĉe priatentita: la litova. Mi citu jenajn influojn:

1. Sufikso "op"

En Esperanto kolektivaj nombroj formiĝas per la sufikso *op*. Gregor¹ supozas renversiĝon de la prepozicio *po* uzata por la distribuaj nombroj. Sed Waringhien² atentigas, ke en pra-Esperanto la sufikso estis nur *o*. Pri la deveno de la *p* li skribas: "Probable, kiel sugestis al mi s-ro B. Gudman, de la prepozicio *po*, kiu evidente havas kelkan sencan rilaton."³ Sed en aldono⁴ li mencias la opinion de d-ro Dalibor Brozovič, kiu en artikolo "Pri la fontoj de Esperanto", publikigita en *Nuntempa Bulgario* (1959, n-ro 1) menciis kiel fonton la litovajn vortojn *dvejópas*, *ketveriópas*, *šešiópas* ktp. de la bazaj numeraloj *dù* (ekzistas ankaŭ *dveji*), *keturi*, *šeši* ktp.; Waringhien nomas la proponitan fonton "tre verŝajna". Mi mem neniel pridubas tion, des pli, ĉar troviĝas ankaŭ aliaj litovismoj.

2. Vorto "tuj"

La adverbon *tuj* D.B. Gregor envicigas inter la francdevenaj adverboj kaj aldonas en la notaro sub n-ro 17: *de tout-de-suite?* (kun demandosigno!)⁵. Waringhien same ĝin kalkulas inter la francdevenaj primitivaj adverboj: *tuj* (*F tout de suite*)⁶. — Al mi ĉiam ŝajnis iomete neverŝajna ĉi tiu etimologio, pro tio, ke fonetike ekzistas tro granda diferenco inter [tuj] kaj [tudsùit]. — En la litova "tuj" signifas *tuŝj*. La diferenco inter la "kungluta dusono" (laŭ la litova gramatiko) *uo* kaj pura *u* estas minimuma. Krome en la nordokcidenta dialekto (*žemaičiai*) ekzistas ankaŭ la varianto *tuj*.⁷

3. Adverba finaĵo "aŭ"

La finaĵon *aŭ* havas kelkaj adverboj kaj prepozicioj en Esperanto, nome: *ankoraŭ*, *baldaŭ*, *hieraŭ*, *hodiaŭ*, *morgaŭ*, *almenaŭ*, *apenaŭ*, *ankaŭ*, *kvazaŭ*, *preskaŭ*, *kontraŭ*, *anstataŭ*, *antaŭ*, *ĉirkaŭ*, *malgraŭ*

kaj la pronomo *ambaŭ*. En neniuj kazoj la finaĵo troviĝas en la fontlingvo, komparu: *ancora* (*encore*), *bald*, *hier* (*ieri*), *hodie*, *morgen*, *almeno*, *appena*, *anche*, *quasi*, *presque*, *contra*, *anstatt*, *ante*, *circum*, *malgré*, *ambo*. Tia finaĵo troviĝas tamen en la litova, ekz-e: *pagaliaŭ* "fine", *toliaŭ* "pli foren", *pirmiaŭ* "antaŭe", *paskiaŭ* "poste", *daugiaŭ* "pli". Per *au* formiĝas la komparativo de adverboj. Mi kuraĝas kunligi ambaŭ finaĵojn pro manko de tiu tipa finaĵo en iu alia al mi konata eŭropa lingvo, sed ĉefe pro la kunliganta senco de adverbo. Bedaŭrinde tiuj formoj ankoraŭ ne troviĝas en la al ni konataj tekstoj de pra-Esperanto; tial ni ne vidas, kiel la finaĵo de la adverboj disvastiĝis ankaŭ al la prepozicioj kaj al la vorto *ambaŭ*.

4. Direkta akuzativo ĉe adverboj

Specialaĵo de Esperanto estas la formado de direkta akuzativo de adverboj, kiel jam en la Dua Libro: *antaŭen*, *kien*, *tien*, *supren*, *malsupren*, poste ankaŭ *ĉielen*, *eksterlanden*.⁸ La litova posedas kelkajn direktajn adverbojn, kiuj finiĝas per *n*, historie ili estas malnova kazo, *ilativo*, ekz-e: *aukštyn* "supren", *pirmyn* "antaŭen", *žemyn* "teren", *gilyn* "profunden".

5. Finaĵo "u" de la volitivo

La finaĵo *u* de la volitivo tute ne estas klara. Gregor⁹ pensas pri hebrea deveno, ekz-e *qumû* "stariĝu". Oni povas pensi ankaŭ pri la mediala imperativo, dua persono singulare en la malnovgreka, ekz-e *paideúou*, *lúou* (prononcu: pajdéúu, lúu). Waringhien atentigas ankaŭ pri tio, ke la *u* estis la lasta libera vokalo uzebla, post kiam *o*, *a*, *e* kaj *i* jam havis a-

1 D.B. Gregor: "La fontoj de Esperanto", Purmerend (reprezo el "Scienca revuo", n-ro 9, p. 92-115), p. 7 k 14.

2 Gaston Waringhien: "Lingvo kaj vivo", Esperantologiaj eseoj, La Laguna 1959, p. 66-67.

3 samloke, p. 67.

4 samloke, p. 450.

5 Gregor (vidu piednoton 1), p. 7 k 14.

6 Waringhien (vd. piednoton 2), p. 61.

7 Laŭ informo de d-rino Šturms, litova lektorino en Bonn.

8 Citita laŭ Waringhien (vd. piednoton 2), p. 157 k 158.

9 Gregor (vd. piednoton 1), p. 6-7.

ESPERANTON?

liajn funkciojn. Tamen leviĝas la demando, kial la volitivo ne havas la finan s. Ĝi ne estas tenso*, jes, sed ankaŭ la kondicionalo ne estas tenso, tamen ĝi finiĝas per *us* kun s. — La litova konjunktivo de la tria persono, kiu egalas la supinon**, finiĝas per *-tu* anstataŭ la infinitiva *-ti* (do *u* anstataŭ *i* kiel en Esperanto *u* anstataŭ *i*!). Malpli verŝajnas tiu ekspliko, pro tio ke la imperativa senco de la volitivo tiel ne klariĝas, sed ĝuste ĝi ŝajnas esti unuaranga.

6. Direkta akuzativo ĉe substantivoj

La uzado de la akuzativo en senco direkta povas esti veninta en Esperanton el la latina, ekz-e *Rōmam* "al Romo, Romon", *domum* "hejmen" k.a., sed ordinare uziĝas prepozicio: *in Græciam proficisci* "vojaĝi Grekujon", *ad urbem uenire* "veni al la urbo".

S-ro A. Poška en Litova S.S.R., responde al la redakcia sinturno pri la praveco de la asertoj de s-ro H. Trunte, skribas: "Forestas iuj ajn duboj, ke la menciitaj faktoj en la artikolo de s-ro H. Trunte estas veraj. Ni tion povas pruvi per abundaj faktoj konservataj en la litova lingvo." Kaj li donis la jenan tabelon, menciante nur tiujn, kiujn s-ro Trunte mem uzis.

	Esperanta	Litova
-op	duopa triopa multopa	dvejopa trejopa daugiopa
po	po du po tri po kiom	po du po tris po kiek
-aŭ	baldaŭ antaŭ ĉirkaŭ	greičiau pirmiau bendriau
-n	alten antaŭen profunden hejmen urben	aukštyn pirmyn gilyn namon miestan
-u	(ke) vidu (ke) diru (ke) punu	matytų sakytų baustų

En la litova ankoraŭ tre ofte uziĝas — kaj pasintjarcente eĉ pli ofte, pli ofte ankaŭ en kelkaj dialektoj — la ilativo, antaŭ ĉio en singularo: *eĥti miĥstan* "iri urbon"; *Ir liĥpĕ Živilĕ jmĕsti kalĕjiman*. "Kaj li ordonis enmeti Živilĕn malliberejon (en la malliberejon).".

Necesas ankoraŭ la demando, ĉu Zamenhof efektive scipovis la litovan. La cititaj ekzemploj tion ja ŝajnigas. Białystok troviĝas proksime de la litova landlimo, tial oni devas supozi, ke en Białystok vivis ankaŭ litovoj. Krome — laŭ Waringhien¹⁰ — d-ro Olsvanger atestis, ke Zamenhof scipovis la litovan.

Pro tio ŝajnas al mi ne riske supozi ankaŭ litovan influon ĉe la elformigo de Esperanto fare de Zamenhof.

Hartmut Trunte
F. R. Germanujo

* tenso = konjugacia formo, montranta, ke la priparolata ago estas nuna, pasinta aŭ estonta. (red.)
** supino = substantiva formo de la latinaj verboj, kiu restas ĉe multaj derivaĵoj. (red.)
10 Waringhien (vd. piednoton 2), p. 450.

Povus esti, ke Zamenhof konis iom el la litova


Koncerne la demandon, ĉu efektive d-ro Zamenhof scipovis la litovan lingvon, faktajn pruvojn ni ne havas. Dum infanaĝo de Zamenhof en Bjalistoko multaj loĝantoj parolis litovlingve. Tion mencias Zamenhof mem. Ni scias, ke li mem kelkfoje asertis, ke lia patrujo estas Litovujo. Precipe li tion akcentis en Buloŝjo-ĉe-Marjo dum la unua Universala Kongreso en la 1905-a jaro.

Dum ioma tempo li loĝis ĉe siaj parencoj en Vejsjeĵaj. Tiu urbeto troviĝas izolita de arbaroj kaj lagoj malproksime de pli grandaj urboj. Lokaj loĝantoj, dzukoj, parolas sian dialekton kaj estas tre konservemaj. En la 1923-a jaro mi vizitis Vejsjeĵaj'n kaj parolis kun maljunuloj, kiuj ankoraŭ rememoris Zamenhofon. Ili rakontis, ke li estis societama kaj ŝatis interparolojn, do povas esti, ke li parolis litovlingve. Sendube, ke la litova lingvo estis iom al li konata.

D-ro Zamenhof, kreante la Internacian Lingvon, ne povis neglekti dum tiu periodo vastajn studojn de eŭropaj lingvistoj, kiuj tre vaste uzis por komparaj celoj la litovan lingvon. Unu el tiuj eminentuloj estis prof. Max Müller, kiu interesiĝis ankaŭ pri internacia lingvo. Eble pere de kompar-lingvistika fonto Zamenhof ĉerpis mankantajn al li formojn.

A. Poška
Litova S.S.R.

“Ĉu penvaloris? Ĉu feliĉas?”



Recenzas Clelia Conterno (Italujo):

Humoroj, de William Auld. La Laguna: Régulo, 1969. 113 p. 19 cm. (Beletraj kajeroj 39).

Nia generacio fine alproksimiĝas al subiro. Niaj haroj grizas, aŭ, se ni volas esti iom malpli realismaj, “arĝentas”. Ni povas pristudi nian pasinton, kaj eĉ nian mallongan estonton, en tiu ĉi mezaĝo nia. Ĉu penvaloris? Ĉu feliĉas? Ne tro.

“Ĉu penvaloris? Ĉu feliĉas? Ne tro” estas la konkludo de la olda Auld en lia kvara poem-libro *Humoroj*. Li enfermas en ĝin sian maturecon skeptikan, spitan, pretan bilanci pasintajn pekojn kaj erarojn: kaj la rezulto de la bilanco, gvida fadeno de la tuta poem-kolekto, estas, ke “ne valoras”, ke la sekvo estos “spleno kaj riproĉoj”, ke “ĉia streb’ abortas”. Restas “nur soifego”, “groteskas l’aspiroj”, kaj “olda kaj eluzita ĉifono” emas perdiĝi kun “murditaj idealoj”. Demando trakuras la versojn, kaj estas mem respon-

do: “Ĉu gravis ĉio ĉi?”.

De la ĉapitroj de “Infana raso” ĝis la nunaj poemoj, tiu ĉi sento pri vakuo de la homaj vivoj kaj de la tuta universo (“galaksio, galaksio — kie Dio? — Mankas”) fariĝis pli intensa, mi dirus paradokse, preskaŭ palpebla: kaj fakte ĝi kristaliĝis en imagoj neforgeseblaj. Kio, tamen, kulpas aŭ respondecas? Ĉu ne estus eble la kruda vero, ke la vivo estas grizaĵo, kaj sole junuloj kaj poetoj ne akceptas tiun ĉi veron, kaj obstinas kredi, ke ĝi estos, — respektive, ke ĝi *devis* esti — io alia?

Tiujn malnovajn problemojn ni alfrontas tra la poezio de Auld, kiu ne plu ludetas kun tipografiaj strangaĵoj, sed koncentrigas konceptojn en imagojn, eĉ en dense signifajn vortojn, kies malofteco evidente plezurigas lin (sed ne ĉiam la leganton, kies kunsenton kaj ĝuon rompas la nekutimeco de kelkaj esprimoj kaj la sekva helpopeto al vort-klarigoj).

Mendu ĉe UEA: 7,20 gld. + sendokostoj 10%.

Nova tradukarta juvelo de Kalocsay



Recenzas Nicolino Rossi (Italujo):

Libero kaj amo, de Sándor Petőfi. Tr. Kálmán Kalocsay. Budapest: Corvina, 1970. 260 p. 19 cm.

Nia fekunda tradukartista Kálmán Kalocsay nin regalas per nova tradukarta juvelo, poemkolekto de Sándor Petőfi. Kvankam fremdas al mi la hungara lingvo, rimabundo, verskvalito kaj glata, populara lingvaĵo konjektigas al mi plenan sukceson. Unue Petőfi vortumas sentojn de nestabila junulo migr-ema: hungara ebena, mizera ĉedanuba kampulvivo, enĉarda* vingajo de drinkemuloj, popolidinaj allogoj kaj amo vibrigas lian poetliuton, kiu baldaŭ plikonsciĝe aŭdigas sonojn de sentmaturiĝo kaj amo. La poeto kuraĝe descendas al sia popolo kaj, identiĝante kun ĝiaj sopiroj, angoroj kaj vivhumuroj, liveras al ni la sonorajn, simplalingvajn versojn pri “Johano la Brava”, kie mizerkampula vivo, fanfaron-aĵoj husaraj kaj felandaventuroj disvolviĝas.

Sed libero estas la fajna, travidebla fadeno kunliganta la tutan poemaron, kaj amo estas aspekto de libero, kiun alstrebas Petőfi, foje rabie perforteca, foje pli milde esperema, sed ĉiam senŝancele konscia pri la neceso de pli justaj vivkondiĉoj por sia subpremata popolo. En “La apostolo” kaj postaj poemoj intense eksonas la instigoj al ribelo kontraŭ ajna tiranismo, al konsciĝo pri amo patruja, pri fundamentaj justoj kaj egaleco interhoma, pri libero ĉiusenca. Je la servo de libero Petőfi falas batalkampe apenaŭ dudeksesjara.

Mendu ĉe UEA: 9 gld. + sendokostoj 10%.

* “ĉardo” = hungara kampara aŭ stepla drinkejo. (PIV)

Infanlibro plena de moralpredikoj

Recenzas Rüdiger Eichholz (Kanado):

La struvelpetro; Beletaj rakontoj kaj komikaj bildoj, de Heinrich Hoffmann. Esperanta traduko de J.D. Applebaum. Dua Eld. Kopenhago: Eldonejo TK, 1971. 24 p. Ilus. 29 cm.

La famekonata infanlibro “Struwwelpeter”, kiun en la jaro 1844 la germana kuracisto Heinrich Hoffmann verkis kaj ilustris por sia fileto, estas denove havebla en nia lingvo. La nova eldono estas luksa represo de la versa traduko de J.D. Applebaum, aperinta en 1921 kaj jam post jaro elvendiĝinta.

La libro estas plena de moralpredikoj, kaj ĝi montras okulfrape, kiomgrade niaj ideoj pri infaneduko ŝanĝiĝis: Timiga tajloro fortranĉas la dikfingrojn de malobeema poleks-suĉanto; infano, kiu ne ŝatas sian suppon, videble maldikiĝas kaj malsatmortas. Araboj certe ne ŝatos legi:

*“Sed bruemaj aĉaj geknaboj,
Kondutantaj kiel Araboj,
Ŝiras vestojn, faras grimacojn,
Ili ne havos kristnaskajn donacojn.”*

Aliflanke la libro atakas rasismojn: infanoj, kiuj primokis negron, estas nigritaj en inkujo. Sed tia traktado kontribuas nur al rasa superec-sento, ĉar ĝi prezentas negron kiel kompatindulon. Prefere oni stimulu la naturan emon al pliemfazo de rasaj karakterizaĵoj, prezentante ilin kiel ĉarmajn distingajojn.

Resume: Ne rekomendinda kiel infanlibro, sed interesa kulturdokumento kaj ekspoziciinda pro aspekto, multkolora preso kaj forta bindo.

Mendu ĉe UEA: 16 gld. + sendokostoj 10%.


Portugallingva taŭga lernolibro

Recenzas Joaquim Calado (Nederlando):

Você sabe Esperanto? — Lernolibro por portugallingvanoj, de Carlos Lima Melo. Dua eld. Fortaleza: Federacia Universitato de Ceará, 1971. 66 p. Mimeo. 31 cm.

La libro konsistas el 20 lecionoj plus unu "speciala" kun ekzemploj de leteroj por amika korespondado, kompleta listo de finaĵoj kaj afiksoj kaj vortolisto kun preskaŭ 1 000 vortoj. Ĉiu leciono konsistas el 20 demandoj kun respondoj plus nacilingva gramatik-klarigo. La sinsekvo de la temoj en la lecionoj estas taŭge elektita. Ankaŭ la disvolviĝo de la gramatikaĵoj estas trafa.

Bedaŭrinde estas, ke ne estas diferenco inter la liter-tipoj de la demandoj kaj de la respondoj.



"Ne rekomendinda kiel infanlibro, sed interesa kulturdokumento kaj ekspoziciinda pro aspekto, multkolora preso..." — infanlibro "La struvelpetro", el kiu la supra bildo estas.



Nekorekta prononc-instruo

Recenzas Pol Denoel (Belgujo):

Parler l'Esperanto, de Renée Volpelière. (Dua eldono) Nîmes: la aŭtorino, 1971. 56 p. 14 x 21 cm.

79 mallongaj lecionoj (kelkaj malpli ol 10 linioj) liveras frazaron en Esperanto kun la paralela traduko en franca lingvo. La dinamisma sinsekvo de la lecionetoj estas bonega. Estas daŭra progresado por la gramatikaj klarigoj (lakonaj, sed klaraj) kaj por la vortotrezoro, prave inspirita de la ĉiutaga vivo. La aŭtorino avertas pri la neceso posedi krome gramatikan lernilon kaj vortaron.

La prononcinstruo konsistas el kelkaj indikoj pri la literoj alimaniere elparolataj ol en la franca. Bedaŭrinde oni kvazaŭ favoras nekorektan uzadon, instruante ke *e* estas prononcata "kiel é, aŭ pli ofte è", ke ekzemple *kie* kaj *kiu* prononciĝas kiel "quillé" kaj "quillou" (kije, kiju), kaj fine ke la akcento signifas *plilongigi* la akcentatan silabon.

Resume bonega konversacia gvidilo, taŭga por "vivi-gi" instruadon.

LASTE APERIS . . .

la unua volumo, 608-paĝa en poŝformato, de *Elektitaj verkoj de Maŭ Zedong*. La kompletaj *Elektitaj verkoj* ampleksos kvar volumojn, supozeble simile ampleksajn. Revolucia verko alispeca, emocia kaj monumenta poemaro, estas *Sileziaj kantoj* de la ĉeĥa poeto Petr Bezruč, nun duafoje aperinta libroforme en Esperanto, iam akceptita por la serio Oriento-Okcidento, sed jen sendepende eldonita.

Vocabulaire espéranto de Michel Duc Goninaz havas la internacian subtitolon *Laŭtema esperanta-franca vortareto*. Pro la laŭtema aranĝo ĝi povas servi en ambaŭ direktoj. (Foto-ilus., 8,— gld., 118 p.)

Homo, lernu de la akvo! estas noveleto 15-paĝa de Bérci Darázs, eldonita de Pedagoga Esperanto-Fakgrupo en Hungarujo en serio Literaturaj Libretoj N-ro 2. D-rino Liisi Oterma en Turku publikigis novan sian esploron en Esperanto: *Pri la kometo 1939 IV P/Väisälä, serĉefemerido por 1971-1972*. Atenton astronomoj!

Ĉiujn mendojn adresu al: Libro servo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 14% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.

“SOCIETAS EUROPEA”

INFORMOJ DE CED

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middx., HA9 8TF, Britujo

“SOCIETAS EUROPEA”

En la Eŭropa Ekonomia Komunumo estas fundamenta koncepto, ke la kvar lingvoj estas absolute samrajtaj. Do ne estas eble, ke nur unu vorto, ekzemple nomo, estas oficiala, sed ĉiam ekzistas paralele kvar terminoj. Tiu principo estis nun la unuan fojon rompita. La gvida eŭropa instanco en Bruselo, la komisiono, kreas novan formon de komerca kompanio, kiu estu idente la sama en ĉiuj kvar landoj. La celo estas, disponigi al la ekonomioj ĉie konatan juran organizaĵon, kies detaloj — ekzemple respondecoj, gvidantoj, kontrolorganoj, kapitalo, bilancado, kundecidrajto ktp. — estas la samaj en la kvar landoj. Ĉe tia institucio estus taŭge, substreki la samecon en ĉiuj kunagantaj landoj per ĉie identa nomo. Tio necesigus *unu nomon*, ne kvar paralelajn nomojn. Vidante antaŭ si la bazan postulon al samrajteco de la lingvoj en la membroŝtatoj la komisiono elektis latinan nomon: *societas europea*.

Temas pri propono de la komisiono, kiu estis sendita kun letero de ĝia prezidanto de la 30-a de junio 1970 al la prezidanto de la konsilantaro de EEK, kiu plusendis ĝin al la naciaj parlamentoj.

Tiu vortelektado klare montras, ke la eŭropaj instancoj estas konsciaj pri la lingvaj problemoj de la komunumo. Kompreneble la latina ne povas esti ĝenerala solvo. Tial elekti unu esprimon el tiu lingvo ne estas la unua paŝo sur vojo kondukanta al solvo, sed nur signo por la nescio pri la eliro el la malfaciloj.

AMASA KANDIDATIGO DE UEA AL NOBEL-PACPREMIO

Laŭ la informoj kolektitaj de CED ĝis la fino de aprilo 1971, minimume 301 kvalifikitaj personoj faris proponon al la Nobel-Packomitato en Oslo, ke Universala Esperanto-Asocio ricevu la Pacpremion por la jaro 1971. Inter la proponintoj troviĝas 132 membroj de la Sveda Parlamento; 74 proponoj venis el Francujo, 44 el Nederlando, 20 el Finnlando, 14 el Danlando. La aliaj proponintoj estas norvegoj, britoj, italoj. Proponoj venis ankaŭ el Ĉeĥoslovakio kaj Usono. Entute do minimume 301 proponoj el minimume 10 landoj. Minimume tial, ĉar eble, eĉ tre verŝajne, estis ankaŭ aliaj proponoj, pri kiuj CED ne estas informita.

Komunikoj en la gazetaro

Pri la kandidatigo de UEA aperis informoj en la gazetoj de Svedujo, Nederlando, Francujo, Pollando kaj verŝajne ankaŭ en tiuj de pluraj aliaj landoj. La sveda Telegrama Agentejo distribuis al ĉiuj gazetoj informon sub la titolo “Parlamentanoj volas doni la Pacpremion al Esperanto”. En la informo estas, interalie, dirite:

“132 svedaj parlamentanoj proponas Universalan Esperanto-Asocion kiel kandidaton por la Nobel-Pacpremio 1971. La proponintoj apartenas al ĉiuj 5 partioj, reprezentitaj en la Parlamento. Ili substrekas la rolon, kiun la Internacia Lingvo, Esperanto, ludas por la interpopola interkompreniĝo.... Oni emfazas la grandan disvastiĝon, kiun la Internacia Lingvo havas, la neceson de komuna lingvo por interpopola kunekzistado, kaj la laboron, kiun faris UEA en la servo de la homamo kaj dum la du lastaj mondmilitoj kaj dum la pactempo.”

En Pollando la informo estis publikigita en ĉiuj ĉefaj gazetoj. Rezulte, en la pola Sejmo (Parlamento) formiĝis grupo de parlamentanoj, kiuj intencas agi por UEA en 1972, se la Asocio ne ricevos la Pacpremion en 1971. Plia rezulto estis, ke kelkaj parlamentanoj komencis lerni la lingvon.

Tute senkonsidere al la demando, ĉu UEA ricevos la premion aŭ ne, la fakto mem, ke ĝi denove estas kandidato kaj ke la proponon prezentis tiom da kvalifikitaj personoj el 9 landoj, klare montras la prestiĝon, kiun ĝuas la Asocio en sia agado por internacia kompreniĝo. Notinde estas, ke la proponoj venis el landoj kun malsamaj politikaj reĝimoj kaj ke ili estis subskribitaj de personoj apartenantaj al ĉiuj politikaj partioj. Kompreneble, tio estus malebla, se unu el la fundamentaj principoj de UEA ne estus la principo de neŭtraleco, kiel ĝi estas difinita en la Statuto kaj aplikata en la praktiko.

Plua flankefiko de la propono estas, ke la vasta publiko estis tiuokaze denove informita kaj pri la Internacia Lingvo kaj pri la agado de UEA per ampleksaj sciigoj en la gazetaro kaj verŝajne ankaŭ per radio — tutcerte en Finnlando.

Kiu rajtas kandidatigi?

El pluraj flankoj oni petis informojn pri la personoj, kiuj rajtas fari proponon. Jen la respondo: 1. membroj kaj estintaj membroj de la Nobel-Komitato kaj konsilistoj nomitaj de la Norvega Nobel-Instituto; 2. membroj de parlamentoj kaj membroj de registaroj de diversaj ŝtatoj, kiel ankaŭ membroj de la Interparlamentara Unio; 3. membroj de la Internacia Arbitracia Kortumo en Hago; 4. membroj de la Konsilantaro de la Internacia Paca Buroo; 5. membroj de la Instituto de Internacia Juro; 6. universitataj profesoroj (ne docentoj aŭ lektoroj) de politika scienco aŭ de juro aŭ de historio aŭ de filozofio (ne de aliaj objektoj); 7. personoj, kiuj jam ricevis la Nobel-Pacpremion. La limdato estas la 31-a de januaro por proponoj rilatantaj al la koncerna jaro.

PLIA DOKUMENTO DE CED EN LA ITALA

La dokumento de CED B/I/2 pri la eduka valoro de Esperanto-instruado en la lernejoj, verkita de la kunlaboranto de CED s-ro R. Markarian, aperis ankaŭ en la itala lingvo. La dokumenton tradukis s-ro N. Dell’Aringa kaj eldonis *Istituto Italiano di Esperanto* de Itala Esperanto-Federacio.



(Fotis: s-ro Borbély J., Hungarujo)

NOVAĴOJ EL ĈI-JARA VINTRA ANTAŬOLIMPIADO

Kulpas litero "B"

"Dum ĉio en la Antaŭolimpikoj ŝajne iris bone, unuafoje okazis problemoj", raportas ĵurnalo pri la vintraj antaŭolimpikaj ludoj ĉi-jare okazintaj en Sapporo, Japanujo. Sovetunia atleto dum konkurso erare turniĝis inter punktoj A ĝis D de la vojo malgraŭ atentigo de japano (en la japana lingvo). Tiu atleto, kiun ĉiuj antaŭvide opiniis gajnonto de la unua premio, miskomprenis la literon B kiel la trian literon de la rusa alfabeto kaj devis rezigni pri la konkurso.

Nefacila varbado de interpretistoj

Fakte, laŭ la raporto de "Japana ekonomika ĵurnalo" (8 feb. 1971) estis la jena situacio lingva, krom la supra eta incidento.

"La nombro de la interpretistoj kolektitaj por Antaŭolimpikoj en Sapporo estis 104; t.e. por la angla lingvo 49, por la germana 22, por la franca 18, por la rusa 12 kaj por la hispana 3. Por kolekti tiom da interpretistoj, la organiza komitato devis malaltigi la kriterion pri la lingva nivelo, pro manko de taŭgaj homoj por interpretado. La organizantojn turmentis kroma faktoro, ke pluraj virinoj el la elektitaj interpretistoj rezignis intertempe por edziniĝo."

Por enkonduko de Esperanto en fakoj sendube necesas, en la komenco, iusencaj pioniraj taskoj. S-ro Ujlaky-Nagy en Hungarujo prenas sur sin tiun taskon por la sportoj.

UJLAKY-NAGY TIBOR

Sur la 38-a paĝo de la februara numero la redakcio de *Esperanto* tre ĝuste kaj realece respondis la leteron de s-ro Jaroslav Tomčík, koncerne la temon: lernolibron por la olimpikaj konkursantoj. Lige kun la 2-a punkto de la respondo mi opinias tre grave raporti ke de kelkaj jaroj mi laboras super studo pri la 30 plej gravaj sportobranĉoj. Tiu studo havos la celon normigi kaj oficialigi certan kvanton da Esperantaj sportaj terminoj kaj esprimoj. La verko ne listigas la vortojn en formo de seka terminaro, sed priskribante la unuopajn sportobranĉojn ĝi aplikas la terminojn libere, en flua, facile komprenebla, tamen faka kunteksto. El tio ĝia planata titolo: *Esperanta Sporta Lingvo*.

La studo ampleksos antaŭvideble ĉ. 200 tajpitajn paĝojn. Ĝis nun mi jam pretigis 20 sportobranĉojn.

Por preventi la erarojn neeviteblajn ĉe laborado de izolulo (t.e. ekz. nesufiĉa internacieco de la vortostoko, lingvaj, eventuale fakaj eraroj, hungarismoj, preteratento de jam vaste uzataj esprimoj ktp.) mi intencas aperigi la studon provizore kiel projekton, multobligitan en limigita nombro, kaj dissendi la ekzemplerojn al kompetentuloj (sportistoj-esperantistoj, redakcioj, lingvistoj ktp.). Nur poste, surbaze de la kolektitaj rimarkigoj, sugestoj kaj kritikoj mi finpretigos la definitivajn variantojn de la studo.

La projekto pretiĝos antaŭvideble post 1-2 jaroj kaj la definitiva verko same 1-2 jarojn post la apero de la projekto. Koncerne la financon bazon de la multobligo kaj poste la preso, ili ankoraŭ ne estas certigitaj, tamen mi esperas sukcesojn.

La definitiva verko servos kiel bazo por la vortaristoj, sed krome ĝi estos bona gvidlibro por diversnaciaj sportistoj-esperantistoj, por interkompreniĝi reciproke sur sia sporta fakteritorio.

Miaopinie estis tute komprenebla kaj evidenta starpunkto flanke de la Olimpika Komitato tiutempe ne okupiĝi pri la peto de UEA; ja ili bone sciis, ke en Esperanto eĉ la ĉefaj sportobranĉoj ne havas ankoraŭ oficialigitan nomon, se ne paroli pri la nomo de la multaj subbranĉoj, disciplinoj, sportiloj, aktivadoj kaj funkciuloj ktp.

Sur la sporta kampo mia studo estos pionira, kaj estos necese, ke la bazan verkon kiel eble plej baldaŭ sekvu aliaj sportaj verkoj, parte traktantaj la ceterajn sportobranĉojn, parte ellaborantaj pli funde, pli detale kaj pli fakte la sportobranĉojn traktatajn en *Esperanta Sporta Lingvo*.

REDAKCIA NOTO: El la de li preparataj tekstoj ni citu kelkajn. Ekz-e por la sportobranĉo "duremila remo": "Vira duremila solopa remo" (t.e. unu remisto kun du remiloj. Formacio: Vira duremila solopo); "Virina duremila kvaropa remo kun stiristo" (t.e. kvar remistoj kun po du remiloj. Formacio: Vira duremila kvaropo kun stiristo)... ktp. Ŝajnas, ke lia projekto, celanta la praktikon, estas tre serioza kaj fruktodona. (Lia adreso: Vásárhelyi P.u. 12, Budapest XI, Hungarujo.)

ĝuu la mondon

Distro estas esenca kondiĉo por bona sano. Se la laboro krakigas vian cerbon aŭ enuigas vian menson, memoru ke elektroniko kapablas redukti la labordaŭron, lasante pli da tempo por ripozamuzo.

Philips produktas radioricevilojn, televidon, diskojn kaj diskludilojn por la amuzo kaj plezuro de ĉiuj. Aktivan distriĝon kaj refreŝiĝon vi trovas uzante magnetofonojn de Philips aŭ, se vi ŝatas fotografion, utiligante ekfulmo-ampolojn, lampojn por projekcio aŭ por la senluma kamero. Junuloj lernas kaj distras sin konstruante aparatojn helpe de la Elektronikingeniera Skatolo de Philips.

La homo bezonas malstreĉon. Philips havigas ĝin.

Sed ĉiam minacas danĝero de malsaniĝo aŭ de akcidento.

X-radiaj kaj medicinaj aparatoj de Philips helpas teni vin en perfekta formo, ne nur por laboro, sed ankaŭ por distriĝo.

Esperantlingva katalogo priskribanta la modernan programon de Philips en X- radiaj kaj medicinaj aparatoj estos baldaŭ havebla. (Philips Medical Systems Division, Eindhoven - Holland)

Elektroniko helpas konstrui mondon pli feliĉan kaj pli sanan.



La "EVOLUON" en Eindhoven, Nederlando, estas konstanta ekspozicio, kiu montras la disvolviĝon de scienco kaj socio. Ĝi estis konstruita por memorigi la 75-an datrevenon de la fondiĝo de Philips.

en bona sano



PHILIPS

SEKTECO



Laŭ la Principaro de Frostavallen, unu el la ĉefaj eraroj de nia informado estas "doni al la Esperanto-movado sektecan karakteron"* . Tio ne rilatas sole al informado, sed ĝenerale al ĉiuj sektoroj de agado por la Internacia Lingvo.

En *Plena ilustrita vortaro* sekto estas difinita kiel "aro da personoj, dividantaj religiajn kredojn, diferencajn de tiuj de la regula, ortodoksa eklezio, de kiu ili apartiĝis." La dua signifo, malpli ofte renkontebla, estas tiu de aro da personoj apartiĝantaj disde la oficiala partia doktrino aŭ, eĉ pli malofte, de filozofia skolo pri unu aŭ kelkaj eroj. Ĝis tiu ĉi punkto ĉio ŝajnas en ordo; precipe se oni ne forgesas, ke tiaj minoritataj grupoj ofte transformiĝas, pro nombraj kreskoj kaj internaj fortikiĝoj, en respektatajn ekleziojn aŭ religiajn komunumojn, en potencajn politikajn fortojn aŭ influhavajn ideologiajn faktorojn. Kaj tiam ili ĉesas esti "sektoj". Menciinde, ke la vorto "sekto" ne estas aplikebla al minoritataj konceptoj en la sfero de sciencoj.

La danĝero komenciĝas ĉe adjektivigo kaj ĝiaj derivaĵoj: "sekta" signifas ne nur "rilatanta al sekto", sed ankaŭ netolerema kaj mallarĝspirita, disputema kaj kverelema, ĉio kun forta nuanco de io malŝatinda aŭ eĉ stulta. En tiu senco oni parolas, ekzemple, pri sekteca politiko aŭ pri sektecaj envioj, ĵaluzoj k.s., eĉ kiam tiuj esprimoj ne rilatas rekte al iu sekto. Objektive, la Esperanto-movado certe ne estas sekto. Precipe ne en la nuna stadio. Nek en senco religia, nek en kiu ajn alia. Ankoraŭ malpli ĝi estas sekteca. Ĝiaj studinstancoj sekvas kaj analizas la evoluon sur la lingva kampo per sciencaj metodoj, kaj la rezultoj de tiuj esploroj indikas, ke la celoj de la Esperanto-movado estas konformaj al la lingva dinamiko en internaciaj rilatoj. La laboro por la Internacia Lingvo ne estas farata en la intereso de iu malgranda grupo, kio ofte karakterizas sekton, sed en la intereso de la tuta socio. Aliflanke, la bazaj principoj de la lingvo mem, kvankam iniciatita grandparte intuicie, plene kongruas kun la postulatoj de la scienco en tiu aparta branĉo. Tial en 1959 Zamenhof estis deklarita

* Ni denove atentigas, ke la "Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo", aŭ mallonge "Principaro de Frostavallen", troviĝas en la broŝuro "Statuto kaj Regularoj de UEA", 1968, p. 58-62.

unu el la grandaj personecoj de la homaro; tial en 1954 Unesko rekonis la signifon de Esperanto por internaciaj intelektaj interŝanĝoj; tial la Propono al UN ĝuas la apogon de milionaj amasoj. Ne, la Esperanto-movado havas vere nenion komunan kun sekto.

Alia afero estas, ke kiu ajn minoritata movado, eĉ la plej serioza, riskas la danĝeron esti rigardata kiel sekteca kun ĉiuj psikologiaj kaj aliaj malavantaĝoj de tiu pozicio: malŝato kaj malestimo, primokoj kaj ridindigoj, kelkfoje eĉ kompleta fremdiĝo kaj ekskomunikiĝo el la socio. Krome, interne, tio ofte kaŭzas gravajn perdojn de valoraj elementoj, kiuj tutsimple ne volas malutili al sia prestiĝo aŭ kariero pro aparteno al ia "sekto". Superflue diri, ke tia situacio, se en ĝi troviĝas iuj partoj de la Esperanto-movado, multege malhelpas la efikecon de informado kaj ankaŭ malrapidigas la disvastiĝon de la lingvo.

Tial la Principaro de Frostavallen rekomendas eviti ĉion, kio povus esti interpretata kiel sekteca: tro multe da steloj kaj flagoj, kantado de la himno kaj aliaj kantoj en nekonvenaj tempo kaj loko, strangaĵoj en la vestoj dum kongresoj kaj aliaj publikaj kunvenoj, uzado de esprimoj "Majstro", "samideanoj", "verdstelanoj" k.s. en nacilingvaj tekstoj (ankaŭ en Esperanto ili povus esti glate ellasitaj), ktp. Estus prudente rekonsideri ankaŭ diversajn iom "romantikajn" nomojn de kelkaj niaj organizaĵoj, ekzemple "Lumanta Verda Stelo" aŭ simile. Kial ne nomi ilin tutsimple Esperanto-societo, aŭ klubo aŭ asocio, depende de la karaktero. Eĉ la vorto "Esperantujo", precipe se uzata en nacilingva teksto, ne ŝajnas tre taŭga.

Plue, necesus forĵeti la erarigan koncepton de "familia rondo", kiu manifestiĝas diversmaniere, interalie eĉ per raportado pri intervenoj de unuopuloj dum internaciaj kongresoj laŭ iliaj personaj nomoj, kvaŭ la tuta "monda familio" povus tiamaniere identigi ilin. "Familia rondo" estas fermita kaj ekskluziva. La Esperanto-movado devas esti malfermita por ĉiuj. Fine, sektecaj ĵaluzoj kaj infanecaj envioj, eĉ se ili kaŝiĝas sub la masko de "demokrata kritiko", estas radikale forigendaj.

Ju pli baldaŭ malaperos la restaĵoj de sektecaj aspektoj kaj elementoj, des pli bone por la Internacia Lingvo kaj des pli facila la tasko sukcese informadi pri ĝi.

— EĤOJ —

La artikolserio pri informado elvokis pozitivajn reagojn kaj sendube jam helpis al plibonigo de informado pri la Internacia Lingvo. Tio klare manifestiĝis ankaŭ dum gazetaraj konferencoj kaj intervjuoj okazintaj en la lastaj monatoj. La aŭtoro de la serio ricevis plurajn dankesprimojn.

La organo de TEĴA "Internacia Ĵurnalisto" reprenis en sia januara-marta numero, 1971, la artikolojn 3 kaj 4 de la serio, "ĉar tiuj artikoloj rilatas ankaŭ al la laboro de la ĵurnalistoj".

La Informa Fakto de UEA rekomendas al ĉiuj landaj informaj faktoj kaj al la lokaj societoj atente pridiskuti tiun artikolserion. "Esperanto" ja publikigas ĝin kun la celo altigi la nivelon de informado por la Internacia Lingvo.



56-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Londono, 31.7. - 7.8.1971

OFICIALA KOMUNIKO

Programo de ISU fiksita

El rekorda nombro da proponoj la Estraro de UEA elektis por la 24-a sesio de Internacia Somera Universitato prelegojn de 10 fakuloj: prof. Adcock (Nov-Zelando), prof. Gim (Koreujo), d-ro Maitzen (FR Germanujo), prof. Peevski (Bulgarujo), prof. Waringhien (Francujo), prof. Reiersøl (Norvegujo), d-ro Tonkin (Usono), d-ro Wells (Britujo), prof. Isaev (Soveta Unio) kaj prof. Lapenna (Britujo). La Rektoro estos profesoro Lionel Elvin, direktoro de la Instituto de Edukado en la Universitato de Londono.

Bonvenon

Por fruaj alvenontoj la Londona Esperanto-Klubo aranĝos bonvenigan vesperon vendrede, la 30-an de julio. La kluba kunvenejo (adreso: 153 Drummond Street) situas nur kelkajn minutojn for de la kongresejo.

Skota skolo reaperos ĉe Brita Vespero

Provizora programo estas preparita por la Brita Vespero, kiu okazos en la impona koncertejo Royal Festival Hall. La plej novaj eroj estas: skotaj popoldancoj kun sakfajfila akompano; deklamado de skota poezio fare de la skota Esperanto-poeto William Auld; deklamado el verkoj de Shakespeare fare de aktoro Nikolaj Rytikov. La programon prezentos la Esperanta verkisto Reto Rossetti.

Filmoj preparataj

Pluraj filmoj por la kongresa filmprezento estas jam en preparo. La Brita Turisma Instanco, kiu jam liveris turismajn faldfoliojn por la kongresanoj, nun promesis liveri filmojn. Oni tradukas ilin en la Internaci-

an Lingvon. Ankaŭ la urbo Keighley en Yorkshire, kie fondiĝis la unua Esperanto-klubo de Britujo, subvencias la preparon de reklamfilmo en Esperanto kaj aperigadas anoncojn en la Esperanto-gazetaro.

Strat-indikoj

"ESPERANTO-KONGRESO" — Laŭ aranĝo kun la aŭtomobilista klubo RAC tiuj vortoj aperos sur pluraj strat-indikiloj en centra Londono. Tio ne nur helpas al la kongresanoj orientiĝi en la urbego sed ankaŭ reklamos la Kongreson antaŭ la publiko. Al aŭtomobilistoj ili tamen ne tre utilis, ĉar estos maleble parki aŭtomobilon ĉe la kongresejo mem!

Infana kongreseto jam certa sukceso

La unusemajna Internacia Infana Kongreseto jam estas plene mendita, kun 72 infanoj el Britujo, Belgujo, Francujo, FR Germanujo, Italujo, Norvegujo, Hispanujo, Bulgarujo, Nederlando, Svedujo kaj Aŭstrujo. (La pli frue anoncita dua semajno ne okazos.) La infanojn prizorgos same internacia grupo da gvidantoj: el Britujo, Belgujo, Jugoslavio, Nederlando, Japanujo, Italujo, Pollando kaj Hungarujo — sub ĉefa gvido de la prezidanto de ILEI, s-ro Raif Markarian.

Ankaŭ la Subtera Mondo bonvenigos vin

Simpla bonveniga mesaĝo en Esperanto atendas tiujn kongresanojn, kiuj kuraĝos enpenetri la subteran mondon de Londono. En la subteraj stacidomoj troviĝos multaj bonvenigaj afiŝoj. Ili kompreneble celos ankaŭ la ĝeneralan publikon kaj helpas allogi atenton al la Kongreso.

Ĝisdata statistiko


Al la 56-a UK aliĝis ĝis la 5-a de majo 1971 entute **1635** kongresanoj (Alĝ. 2, Arg. 5, Aŭstral. 6, Aŭstrujo 18, Belg. 44, Braz. 2, Brit. 385, Bulg. 84, Ĉeĥ. 8, Dan. 37, Finn. 66, Franc. 241, Gano 1, FR Germ. 131, Grek. 5, Hisp. 46, Hung. 15, Irl. 2, Isl. 3, Isr. 7, Ital. 82, Jap. 36, Jug. 33, Kanado 11, Kore. 4, Ned. 116, Norv. 36, NZ 4, Pol. 19, Port. 4, Rum. 4, Sov. 2, Sved. 101, Svis. 28, Tajl. 1, UAR 2, Usono 44.)

La "piedo" de Anglujo, la kvar plej okcidentaj graflandoj, enhavas multajn ĉarmajn urbetojn, historiajn vidindaĵojn kaj ravajn pejzaĝojn. Por la angloj mem ĝi estas eble la plej vizitata libertempa regiono de la lando.

Al la koro de tiu regiono, al la urbo Exeter, iras unu el la postkongresaj ekskursoj, de la 8a ĝis la 12a de aŭgusto.

Sur la foto: la haveno de Mousehole, fiŝkaptista vilaĝo en Cornwall.





"Mi deziras al Esperanto multe da sukceso", skribis Udo Jürgens, la konata populara kantisto germana. Tiun deziron li ankaŭ konkrete esprimos, ĉar baldaŭ aperos kantoj de Udo Jürgens en Esperanto sur nova disko.

LOKE

F.R. Germanujo

- La 49-an Germanan Esperanto-Kongreson, okazintan en Nürnberg de la 9-a ĝis la 12-a de aprilo 1971, partoprenis proksimume 200 personoj, inkluzive de la gastoj el 9 landoj. Krom pluraj ĵurnaloj, Bavaraj Televido kaj Radio objekte raportis pri la kongreso.
- La alvokon pri la enketo rilate al la Internacia Lingvo, senditan al ĉiuj 825 ĵurnaloj en la lando, publikigis pli ol 40 el ili. La enketadon volas disvastigi la iniciatinto Hermann Behrmann (delegito de UEA en Löhne) ankaŭ al la eksterlando, nomante ĝin "Internacia Enketo". La angla kaj la franca tradukoj de la enketfolio nun estas preparataj.

Francujo

- La 63-an francan kongreson okazintan en Lyon ĉeestis 230 personoj el 12 nacioj; la inaŭguron ĉeestis interalie s-ro Rabuel, reprezentanto de la Ministrejo pri Nacia Edukado kaj de la Departemento pri Junularo kaj Sportoj, kaj s-roj Bayer kaj Marc, vicurbestroj de Lyon. En sia rezolucio, la kongreso petis la ministrejon pri nacia edukado doni al Esperanto la saman rangon en la ekzamenoj kiel al la naciaj lingvoj.
- Relative juneca estis la aspekto de la 10-a Paska Kultura Semajno en Grésillon okazinta en aprilo 1971. Partoprenis ĝin 20 universitataj studentoj el Aix-en-Provence kaj el Clermont-Ferrand kaj 20 liceaj kaj kolegiaj studentoj, krom 30 plenaĝuloj. Prelegis interalie s-ro Jean Thierry, estrarano de UEA.

Pollando

- La ŝtata turisma oficejo aranĝas 1-an Ferialdon Esperantistan kun internacia karaktero, en Szczecin de la 22-a ĝis la 29-a de junio 1971. Inter la programoj estos tendarfajro kaj prelego de s-ro Andrzej

Pettyn el Pola Radio. (Adreso de Tutpollanda Turisma Oficejo en Szczecin: Pl. Lotników 7.)

- En Krakovo estas fondita Krakova Konsilantaro de la Soci-Kulturaj Societoj, kies tasko estas kunordigi la kultur-klerigan agadon de la tuta krakova regiono. La Konsilantaro arigas tri grupojn de la societoj, nome: societojn de amikeco (inter kiuj troviĝas ankaŭ Pola Esperanto-Asocio), artajn societojn kaj histori-sciencajn societojn. Kiel la prezidanto de la societoj de amikeco kaj samtempe vicprezidanto de la Konsilantaro estas elektita s-ro Marian Kostecki, la vicprezidanto de la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio.

Usono

- Moviĝanta seminario estas organizata de la Ŝtata Kolegio de San Francisco kaj de la Unuiĝo por Fremdlanda Studo. La seminario okazos, kun gvidado de s-ro William Auld el Skotlando kaj d-ro Richard L. Trapp de la Ŝtata Kolegio de San Francisco, en Londono dum la UK, en Edinburgo dum la Internacia Junulara Kongreso kaj en la fama Kastelo Grésillon (Francujo), kio daŭros proksimume unu monaton. Studentoj de la seminario povos ricevi post ĝia finiĝo 4 lerneajn "unuojn".

FAKE

Biblioteko

- La Urba Publika Biblioteko en Kortrijk nun havas Esperanto-Sekcion, kiu eldonis Esperant-lingvan katalogon de Esperantaj eldonaĵoj. La Biblioteko, ĝis la jaro 1969, havis nur unu Esperantan libron. Sed post instigoj de kelkaj esperantistoj en Kortrijk ĝi nun regule aĉetas kaj akceptas donacitajn librojn. Hodiaŭ ĝi jam havas proksimume 150 volumojn.

Fervojo

- La Centra Oficejo de la Fervojista Postlaboro en la Ŝtataj Fervojoj de Italujo en cirkulero (DL.CST/

7579/74-14) faris alvokon al ĉiuj prezidantoj de la sekcioj de la Fervojista Postlaboro, Departementaj Direktoroj kaj departementaj delegitoj pri kulturo — post konstato pri la funkcia Esperanto dum la 22-a Internacia Kongreso de la Esperantistaj Fervojistoj en Rimini en 1970 — por realeca kaj efika helpo cele al disvastigo de Esperanto.

Informado

- Produkti sondisketon por ĉiuj nacioj en respektivaj lingvoj pri Esperanto planas s-ro K. Macubara, kiu nun serĉas kunlaborantojn el ĉiuj nacioj. (Lia adreso: ĉe Amo-Akademio, Tenmori, Kozoĵi, Aiĉi-ken, Japanujo.)

Lingvoj

- Aperis lastatempe en usona gazeto *The Plain Truth* du artikoloj pri internacia lingvo: *The origin of languages* (La origino de lingvoj) kaj *Coming soon — A world language* (Venonta baldaŭ — Monda lingvo). Ili estas senpage haveblaj ĉe Ambassador College Press, P.O. Box 111, Pasadena, California 91109, Usono.

Muziko

- Pola kanzonisto-aktoro Andrzej Tomecki prezentis kelkajn Esperanto-kanzonojn en Bavara Radio (F.R. Germanujo) en la 27-a de aprilo 1971.

Religio

- Evangeliajn diskojn en multaj lingvoj produktas kaj senpage disdonas tra la mondo: "Gospel Reading in Canada", 2 Audley Street, Toronto 530, Ontario, Kanado. Ĝi, onidire, certe farus Esperantan eldonon, se la interesitoj petus tion.
- En la 18-a de aprilo 1971 dum Pasko, en Bukureŝta Ĉefkatedralo (Rumanujo) oni legis la Evangeli-

on en 12 lingvoj, i.a. Esperanto. Amaso da ĉeestantoj admiris la belsonan Esperanton, kaj pluraj el ili petis informojn pri ebleco eklerni ĝin.

Turismo

- En Hungarujo dum la feria periodo ripete aperis la bone videblaj reklamoj de la Akademia Ŝtata Eldonejo en la ĉefaj ĵurnaloj. La reklamtekstoj anoncis, ke vojaĝantoj al la eksterlando ne forgesu kunporti la fremdlingvajn turistajn vortarojn, inter kiuj viciĝis ankaŭ la Esperanta/hungara turista vortaro de prof-o Alfons Pechán.
- La Turist-Trafika Asocio de Okcidenta Marbordo de Svedujo lastatempe eldonis esperantlingvan turisman prospekton de urbo Gotenburgo kaj modele kunlaboras kun la tiea UEA-fakdelegito pri turismo. La prospekto estas havebla ĉe la Asocio (Väst kustens Turisttrafikförbund, Parkgatan 2, S-411 38 Gotenburgo).

PERSONE

Cseh


- La Stokholma Pacasocio, kiu donas premion en po 3 jaroj al persono multe kontribuinta al la antaŭenigo de la Internacia Lingvo, ĉi-jare aljuĝis sian premion al s-ro Andreo Cseh, honora membro de UEA, pro lia unika iama agado tra multe da eŭropaj landoj, i.a. Cseh-metodaj kursoj. Antaŭ 3 jaroj ricevis la premion s-ro Einar Dahl, komitatano de UEA kaj siatempa sveda parlamentano.

Jonas

- S-ro Franz Jonas, prezidanto de Aŭstrujo, estas reelektita kiel la ŝtata prezidanto por la venontaj 6 jaroj. Estas konate, ke pasintjare li salutis la Universalan Kongreson en Vieno en flua Esperanto.

Lastatempe naciaj kongresoj precipe en Eŭropo pli kaj pli fariĝas internaciaj. La dekstra foto montras unu scenon ne oficialan de la ĉijara Germana Esperanto-Kongreso, kiun ĉeestis gastoj el 9 landoj (Vidu ĉe F.R. Germanujo kaj eventuale ĉe Francujo.)





TEJO-redaktoro:
Wim Jansen,
Röntgenstraat
32 A,
Vlaardingen,
Nederlando

"PASPORTO" · RENOVIGITA

Certe vi iam aŭdis pri Programo Pasporto de TEJO, ĝis januaro 1971 gvidata de d-ro Feldman González en Argentino. Tiu programo temis ĝis tiam pri ĉefe du grupoj de kunlaborantoj: 1) la "gastigantoj", kiuj invitas eksterlandanojn sen peto pri rekompenco; 2) la "gastoj" — junaj esperantistoj, kiuj vojaĝas eksterlande.

Al gasto oni certigis almenaŭ dusemajnan senkoston restadon inkluzivantan tranoktadon, ĉiujn manĝojn ktp. Pro tio, ke tiuj kondiĉoj montriĝis iom severaj, la reto de volontuloj restis sufiĉe malgranda: laŭ la tria jarraporto de Programo Pasporto ekzistis fine de la jaro 1970 entute nur 49 gastigantoj en 17 landoj. Do ŝajnis bezonata iu ŝanĝo. Grupo de junaj esperantistoj en la okcidentgermana Ruhr-regiono (Ruhra Esperantista Junularo, sub gvido de George Winkler) transprenis la gvidadon de la programo kaj okupis sin pri ĝia reformo kaj pliaktualigo. Sekve la devigaj kondiĉoj estis tute ŝanĝitaj. Oni ne plu demandas: "Kiu pretas senrekompence gastigi kaj manĝigi eksterlandanojn dum sufiĉe longa tempo?", sed nun la demando estas: "Ĉu ankaŭ vi pretus almenaŭ iel tranoktigi eksterlandajn esperantistojn por minimume du noktoj?"

Memkompreneble ankaŭ hodiaŭ Programo Pasporto akceptas pli ampleksajn servofertojn, kiel ekzemple la supre menciitan dusemajnan gastigadon inkluzive de ĉiuj manĝoj, sed tio nepre ne plu estas la minimuma postulo. Do ne plu ekzistas ia grava kaŭzo, kiu povus malhelpi la kunlaboron kaj gastigoferton de

ĉiu helpema esperantist(in)o, ĉu juna aŭ maljuna, se li aŭ ŝi nur disponas pri ia tranoktebleco. Cetere, se iu gastigonto ŝatus ricevi ian monan aŭ alispecan rekompencan, li (ŝi) povas tion menci laŭ la nova regularo en la gastig-aligilo.

Oni povas aliĝi al la reto de gastigantoj, plenigante la gastig-aligilon, kiun vi petu ĉe Ruhra Esperantista Junularo — Pasporta Servo de TEJO, D-42 Oberhausen Sterkrade, Jaegerstrasse 27, FR Germanujo. Per resendo de via plenigita aligilo al la sama adreso vi ebligas al iu eksterlanda amik(in)o viziti vian landon kaj konatiĝi kun Esperantujo!

♦ ♦ ♦

Ruhra Esperantista Junularo, kiel organizanto de la Pasporta Servo de TEJO, klopodis okaze de la UK de UEA en Londono eltrovi malmultekostajn tranoktad- kaj matenmanĝeblecojn por junaj esperantistoj.

Jen ni prezentas la rezultojn: por la periodo inter la 31-a de julio kaj la 7-a de aŭgusto la Pasporta Servo de TEJO ofertas al ĉiu juna esperantisto tranokton kaj matenmanĝojn je la malalta sumo de po proksimume 80 guldenoj por ĉiu persono por la tuta aranĝo. La loĝejoj estos centre situantaj studentaj hoteletoj. Bedaŭrinde la Pasporta Servo disponas nur pri limigita kvanto da antaŭmenditaj litoj, do, se interesas vin tiu ĉi tre malmultekosta oferto, skribu tuj al la korespondadreso de la Pasporta Servo de TEJO, trovebla aliloke sur tiu ĉi paĝo.

FORPISIS PROFESORO BOKAREV

EŬGENO A. BOKAREV

Post longedaŭra malbonsano forpasis la 11-an de marto prof. d-ro E.A. Bokarev, konata soveta lingvisto kaj membro de la Akademio de Esperanto. Doktoro de filologiaj sciencoj, prof. Bokarev estis vic-direktoro de la Instituto de Lingvistiko de la Soveta Akademio de Sciencoj kaj ĉefo de la sekcio pri kaŭkazaj lingvoj en la sama Instituto. Sur lingvistika kampo li kunlaboris ekde ĝia fondiĝo kiel membro de la Redakta Komitato de la revuo de CED "La Monda Lingvo-Problemo".

Lia kontribuo al la Esperanto-movado estis tamen ankaŭ rekta kaj historie grava. Jam en 1956, post la unuaj mildiĝoj en la oficiala sinteno al Esperanto, li prezidis Iniciativan Grupon de Sovetuniaj Esperantistoj, kiu celis prepari la fondon de asocio. Samjare li aliĝis al UEA kaj en 1958 fariĝis fakdelegito pri lingvoscienco. En 1963 li fariĝis membro de la Akademio de Esperanto kaj estis samjare la unua oficiala delegito de Soveta Unio de post la Dua Monda Milito ĉe la Universala Kongreso en Sofio, kie li salutis



E. A. Bokarev

en la Inaŭguro. En 1965, kiam fondiĝis la Komisiono de Sovetaj Esperantistoj en Moskvo, li nature fariĝis ĝia prezidanto, kaj en tiu ofico li restis ĝis la morto. Li prelegis en ISU en Budapeŝto (1966), kaj samjare aperis en 50 000 ekzempleroj lia granda 536-paĝa *Rusa-Esperanta Vortaro*. (La volumo Esperanta-Rusa estas ankoraŭ aperonta.)

LÁSZLÓ SOMLAI (1906–1971)

Post longa malsano, la 12-an de marto en Budapeŝto mortis László Somlai, fakdelegito de UEA pri literaturo, iama kunlaborinto de *Literatura mondo*, kiam ĝi estis redaktata en Budapeŝto. Estas mirinde, ke li tradukis en Esperanton pli ol cent diversajn hungarajn literaturaĵojn, el kiuj la plej menciindaj estas "La knaboj de Paŭlo-strato", "La vojoj estas nekonnataj", "La strato de fiŝanta kato", "Amara pano", "Printempo de morto", "Sep vangofrapoj". Li estis ankaŭ posedanto de unu el la plej riĉaj privataj Esperanto-bibliotekoj en la mondo. La estraro de Hungara Esperanto-Asocio metis florkronon sur lian tombon.

En kiu lingvo estas skribita la suba teksto?

Софно, 22 III 71
Естимата професоро,
хус ми ридевис виан лeтeрoн дe лa 14 III 71 кaм
ми рaпидaс рeспoндити aл ви, чaр мoргaу мaтeнe ми
фoрвoйднaс пoр прeскaу дy сeмaйнoй. Ми скривас aл
ви пeр цирилa aлфaбeтo, eстaнтe цeртa кe ви бoнe
рeгaс дхмн, чaр млa скривмaинo хeймa нe пoсeдaс
лaтинaн литeрaрoн. Мaнкaс тeмпo дoнн мнaн мaнyскрип-
тoн eн лa кaнцeлaрнo дe БEА пoр рeтaйпaдo пeр лaтин
литeрa мaшнo. Пaрдoну пoр лa eвeнтyалa днeнo!

Ĉu vi divenis? Se vi scias la rusan, bulgaran, serban
aŭ alian lingvon, kiu uzas cirilan alfabeton, vi certe
solvigis la enigmon.

Temas pri Esperanto skribita per cirilaj literoj. La le-
teron skribis s-ro N.B. Aleksiev, komitatano de UEA
kaj prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, al la
prezidanto de UEA.

En la publikigita parteto s-ro Aleksiev klarigas, ke en
la hejmo li ne havas skribmaŝinon kun latinaj literoj
kaj tial skribas per cirilaj, kaj senkulpigas sin pro tio.
Ĉar la cirila alfabeto estas fonetika, oni povas skribi
Esperantan tekston per cirilaj literoj kaj ĝi estas per-
fekte komprenebla, se oni scias — la cirilan alfabete-
ton.

NEKROLOGOJ

R. RALF BONESPER (1897-1971)

En la 3-a de marto forpasis en Usono Ralph R. Bo-
nesper, konata kiel hungara maristo, kiu vojaĝis tra
la mondo uzante Esperanton. Dum sia vivo, li i.a. or-
ganizis Esperanto-grupon de maristoj en Antverpeno
(Belgujo) kaj fondis laboristan "Esperanto-Asocion"
en Novjorko.

MARY LUPLAU (1865-1971)

Forpasis en la 28-a de marto en Nov-Zelando Mary
Luplau, la plej aĝa (sed aktiva) esperantistino en la
mondo kun 106 jaroj (vd. *Esperanto*, junio 1969, p.
108). Malgraŭ tioma aĝo, ŝi restis sana ĝis la morto.
La kremacion ĉeestis la prezidanto kaj vicprezidanto
de la Esperanto-societo de Auckland.

A.B. HOLNESS

Dumviva Membro de UEA A.B. Holness forpasis en
la 25-a de marto 1971 en Carnforth, Britujo.

Esperanto en radio

RADIOVOX en Muritiba (Brazilo) prezentas, de la
jaro 1964, ĉiusemajnan duonhoran programon en
Esperanto. Tiu programo konsistas el informoj, kur-
so, muziko, deklamado. Ĝi estas prizorgata de s-ro
Manoel Borges dos Santos kun la helpo de s-roj
Evandro Mota kaj Arlindo José Kardec. La respon-
deculo sukcesis venki la malfacilaĵojn, kiuj interrom-
pis la programon dum mallongaj periodoj en 1968
kaj 1970. Kvankam la sendilo havas nur mallongan
trafpovon, salutkartoj kun gratuloj estus dezirindaj;
pro la privata statuto de la stacio, pli bone estus sen-
di ilin al la patrono de la programo, Farmacia S. Lu-
iz, Rua Ramiro Costa 5, Muritiba (Bahia), Brazilo,
kiu tiel malavare helpas la lokajn esperantistojn.

POLA RADIO, okaze de la 56-a UK en Londono,
disaŭdigos specialan serion da programoj pri Espe-
ranto kaj la UK en la angla lingvo. Tiuj elsendoj ce-
las atentigi la britajn aŭskultantojn pri Esperanto,
pri la grava renkontiĝo okazonta en ilia ĉefurbo, pri la
pola Esperanto-movado kaj pri pola-brita kunlaboro
pere de Esperanto. La "anguletoj" estos disaŭdigataj
la 2-an, 16-an, 30-an de junio, 7-an, 14-an, 28-an de
julio fine de la anglalingvaj elsendoj je 16.00 kaj
20.30 (GMT). Ĉiujn korespondaĵojn oni sendu al Es-
peranto Corner, Polish Radio, British Section, P.O.
Box 46, Warszawa 1, Pollando.

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem,
kelkaj nur en la urbo): Bratislava, Clermont-Ferrand,
Columbus, Gdańsk (M.F.), Muritiba, Rosario, Sher-
brooke, Stoke-on-Trent, Sorocaba;

b) stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj ĉirkaŭmeditera-
neaj landoj: Bern (75.28 m, 48.66 m, 31.46 m), Bil-
bao (aŭdeble en sudokcidenta Eŭropo), Gdańsk (es-
cepte de 66.29 Mcs), Pekino (vesperaj elsendoj ven-
drede kaj sabate), Roma, Sofia, Tallinn, Valencia
(en suda Eŭropo), Warszawa, Wien (aŭdebla en cen-
tra Eŭropo), Zagreb;

c) stacio aŭdebla en Azio: Pekino (dimanĉe kaj
sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT);

ĉ) stacio aŭdebla en Afriko: Bern (31.28 m,
25.60 m, 25.28 m, 19.60 m, 19.44 m, 16.86 m,
13.94 m).

Tio estas nur ĝenerala skizo, variigebla laŭ mode-
lo de la ricevilo, atmosfera kondiĉo, lokaj kondiĉoj
diversspecaj.

La franca program-gazeto *La Semaine Radio-Télé* en
sia numero 18 (1-7/V/71) publikigis sur duonpaĝo
sub la titolo "Pour les espérantistes" tradukon de
komunikaĵo de Pola Radio pri esperantlingvaj el-
sendoj el la varsovia stacio kaj programojn de la ĉe-
faj disaŭdigoj el aliaj stacioj en Esperanto, kiujn s-ro
G. Larglantier sendis al ĝi.

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29
Bd. Murat, F-75-Paris (16^e), Francujo. Por aliaj de-
taloj vidu la aprilan eldonon.

INSTITUCIO HODLER '68

— Ekstraktoj el la jarraporto 1970

Estraro: En la komenco de 1970 la Estraro de Instituto Hodler 68 konsistis el: s-ro M. Jaumotte (komitatano de UEA kaj antaŭa estrarano), prezidanto; s-ro G. Maertens (komitatano de UEA kaj revizoro de la Centra Oficejo), vic-prezidanto; s-ro E. Haver-Schmidt (notario kaj specialisto pri investado), kasis-to; d-ro Bormann (komitatano de UEA kaj revizoro de la C.O.), membro. Kiel administranto plue funkciis f-ino M.H. Vermaas.

Ĝuste antaŭ la Kongreso en Vieno trafis la Estraron grava bato pro la subita forpaso de s-ro Jaumotte, kiu bedaŭrinde nur mallongan tempon povis doni sian energion kaj entuziasmon al la Instituto. De tiu am s-ro Maertens funkciis kiel aganta prezidanto.

Kapitalo: Je 31.12.70 la kapitalo atingis la sumon de 129 711,29 gld. Ĝi konsistas el 35 pruntoj kun rento (a), 46 pruntoj sen rento (b) — ĉiuj po 1 000,— gld. proksimume — kaj donacoj je ĉiaj sumoj, kies tuto atingis 47 829,18 gld.

Elspezoj: En 1970 la elspezoj de la Instituto sumis 2 072,33 gld. Tiu sumo ampleksas i.a. la malprofiton de la komenca jaro 1969, la rentojn je la pruntoj (a), kompenson de la administranto, presigon de raporto por la kongresanoj (flava cirkulero) ktp.

Profito: La spezkonto de 31.12.70 montras netan profiton de 7 090,85 gld.

Investoj: En majo la Instituto aĉetis 8%-obligaciojn 1970/1978 de tre solida *Amsterdam-Rotterdam Bank N.V.* je kurzo 99,25%. La nominala valoro estas 20 000,— gld. En junio oni aĉetis loĝdomon en Rotterdam je la sumo — inkl. kostojn — de 34 924,49 gld. Ĝi produktas malnetan lupagon de 4 856,40 gld., kiu sumo altiĝos ekde 1.4.71 al 5 212,20 gld. Post tio sekvos ĉiujaraj altigoj de po 6%. La fiksitaj ĉiujaraj elspezoj pro impostoj, asekuro kaj akvo estas 852,15 gld. Ankaŭ tiu sumo en venontaj jaroj proporcie altiĝos en la kadro de la ĝeneralaj prezaltigoj.

Resume: Oni devas konstati, ke la kapitalo tro malrapide kreskas. Sendube kaŭzis tion i.a. la fakto, ke pro la forpaso de s-ro Jaumotte fiaskis la varba kampanjo planita dum la kongreso en Vieno, kiun li intencis gvidi. Plia varbado helpe de la instancoj de UEA estas necesa. Ni fidis i.a., ke dum la venonta kongreso en Londono estos trovita konvena formo por instigi efikan kreskigon de la kapitalo, kiun la movado tiel nepre bezonas.

La Estraro de Instituto Hodler 68

OFICIALA INFORMILO

N-ro 446, 1 majo 1971

PRI "LA PRAKTIKO"

Kiel la abonantoj de "La Praktiko" jam rimarkis, ne aperis la gazeto "La Praktiko" de post la decembra numero de 1970. Jam de kelka tempo la gazeto havis gravan malfruon, kaj la redaktoro, s-ro Luin, ne plu povis daŭrigi la laboron pro premo de aliaj taskoj. Post atenta konsidero de tiu situacio kaj ankaŭ de la malbona financa stato de "La Praktiko", la Estraro de UEA decidis ĉesigi la eldonadon.

La abonantoj por 1971 ricevos cirkuleron pri repago de la abonkotizo. La kotizperantoj de UEA bonvolu ne plu akcepti la abonojn.

RAPORTAS KORESPONDA SERVO

Dum 1970 estis starigitaj 420 novaj slipoj, el kiuj 40 rilatas al kolektivaj aliĝoj, ĉu lernejoj, ĉu grupaj, entenantaj prok-e 600 gestudentojn de Esperanto. La sliparo kreskis ĝis 3920. Plie alvenis prok-e 200 renovigitaj korespondpetoj de antaŭajaroj uzantoj de la Servo, ĉiam notitaj sub ilia unua aliĝnumero. 650 uzantoj ricevis rektan respondon. La financa stato de la Servo estas en ordo. Raporto pri la agado de la Koresponda Servo de UEA aperas en "Bulteno" de la Internacia Federacio de Organizaĵoj por Lernejoj Korespondado kaj Interŝanĝado. La Servon gvidas f-ino C. Hueter, 12 rue des Jacobins, F-63-Clermont-Ferrand, Francujo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ


Berlin, s-ino W.; Halmstad, Svedujo
McCanlis, s-ro E.W.; Stalybridge, Britujo
McLeod, s-ro J.F.; Jacksonville, Usono

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1971

203 Rabêlo, s-ro A.; 204 Varanda, s-ro J.; Brazilo.
205 Schleicher, s-ro I.; Danlando. 206 Vuolo, s-ro L.; Finnlando. 207 Henderson, s-ro D.C.; Kanado.
208 Eriksson, s-ro A.; 209 Olsson, s-ro O.; 210 Söderberg, s-ro K.; Svedujo. 211 Raia, s-ro S.; 212 Spencer, s-ro T.H.; Usono.

ENSPEZOJ


9 163,18 gld.



La apudaj grafikaĵoj montras, kian profiton donas la kapitalo de Instituto Hodler '68 kaj kiel ĝi estas uzata. Kiel oni vidas, la plej granda parto de la enspezoj estas neta profito, kiu iris ĉi-jare unuavice al UEA pere de la Centra Oficejo kaj la Fondaĵo Canuto.

DISDIVIDO DE LA PROFITO

7 090,85 gld.



La destino de la neta profito

Laŭ la raporto (4.4.1971) de f-ino M.H. Vermaas, administranto de la Instituto, la destino de la neta profito en 1970 (t.e. 7 090,85 gld.) estas decidita de la Estraro de la Instituto en ĝia jarkunveno en 1971 jene.

- 1) 2 400 guldenojn ricevos Fondaĵo Canuto por membrigi 80 esperantistojn en nepagipovaj landoj en la kategorio MA. Kondiĉo estas, ke tiuj membroj ankaŭ siavice ion faru por UEA; ili estu zorgite elektitaj personoj, kiuj kapablas kaj pretas almenaŭ esti fakdelegitoj pri seriozaj profesioj;
- 2) 1 000 guldenojn ricevos la Akademio de Esperanto kiel subvencion.
- 3) 2 500 guldenojn ricevos la Centra Oficejo kiel unufojan specialan ekstraĵon disdividotan inter la oficistaro. La Instituto deziras per tio esprimi aparte al ĉiuj geoficistoj sian altan aprezon pro la granda dediĉo kaj sinofero, per kiuj ili plenumas vere abundajn kaj pezajn taskojn en servo de Esperanto en monda kadro;
- 4) 750 guldenojn ricevos Fondaĵo LMLP por helpi la pluan ekzistadon de tiu gravega revuo;
- 5) 440,85 guldenoj estos transskribitaj al la risiko-rezerva konto de la Instituto laŭ art. 16 de ĝia statuto.

Nova estraro

S-ro G. Maertens (Belgujo), prezidanto;
D-ro W. Bormann (F.R. Germanujo), vic-prezidanto;
S-ro E. HaverSchmidt (Nederlando), kasisto/estraro pri financado.

DONACOJ (gld.)

Fondaĵo Canuto: Francujo: F. Micoud, 45,—. F.R. Germanujo: H. Wilke, 30,57. Sumo ĉijara ĝisnuna 313,85.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: F.R. Germanujo: H. Borchert, 2,96; J. Kleber, 2,96; F. Kunze, 3,69; H. Trunte, 2,96. Sumo ĉijara ĝisnuna 136,42.

Ĝenerala kaso: Belgujo: Najbarino Martens, 40,—. Britujo: H. Davis, 25,70. F.R. Germanujo: D.L. Masterman, 30,—. Hispanujo: Manuel Monléon, 4,08; Ramón Molera, 12,19. Kolombio: J.M. Gómez Ochoa, 7,89. Svedujo: A. Johansson, 6,95; s-ino M. Johansson, 24,83. Usono: s-ino Margaret L. Barkley, 7,48; B.D. Emmart, 39,84; E.D. Walters, 35,70. Sumo ĉijara ĝisnuna 1 747,66.

Kampanjo "100 x 100": (Por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum tri jaroj ekde 1971 po 100 gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj.)

30 Eriko Sunardo, Indonezio

31 A. Zepeda, Meksiko

32 Robert Alberg, Israelo

Patrono A de TEJO: 34 f-ino A. Casetta, Italujo. 35 Raymond R. Neri, Usono. 36 E.C. Pollock, Usono.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

INFORMEJO

Ne propagando, sed informado

Oni demandas

La vorto "informado" ne sufiĉas, kiam la esperantistoj finfine celas, ke la homoj lernu la Internacian Lingvon, ĉu? Ne nur informi, sed propagandi necesas.

Ni respondas

Konsentite, ke ne sufiĉas nur kvazaŭ indiferece informi pri Esperanto, sed necesas ankaŭ persvadi kaj konvinki. La Principaro de Frostavallen deklaras, ke estas eraro "nomadi la informadon pri Esperanto *propagando*". Tio celas precipe la nacilingvan uzadon, ĉar en multaj naciaj lingvoj la ekvivalento de "propagando" havas malagraban nuancon de neobjektiveco. En la pasinteco la informado pri Esperanto ofte estis efektive neobjektiva, troigita aŭ fantazia. Eĉ kiam ni efektive propagandas la lingvon, ni uzu nur objektivajn argumentojn. Uzi prefere la vorton "informado" helpas memori pri tio.



ANONCETOJ

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

14- kaj 15-jaraj knabinoj en Covasna, Rumanujo, deziras korespondi pri diversaj temoj. De maldekstre, supre, f-inoj Karsai Katalin, Geose Ibolya, Isán Katalin, kaj malsupre, f-inoj Páll Tünde kaj Szász Márta. Interesitoj skribu al la UEA-delegito en Covasna, s-ro Jenő Zágoni, str. Gábor Áron 30, Judetul Covasna.

Famekonatan francan brandon Konjako disvendas s-ano Despeyroux, reprezentanto, 200 Fg St-Denis, F-75-Paris 10^e. Altkvalito garantiita. Ekspedo el la produkto al ĉiuj pagipovaj landoj.

Ferioj en Insulo Madeira. En loko la plej ŝatata, apud la maro, esperantistino luigas du ĉambrojn, banejojn, matenmanĝon. Skribu al Elisa Caetano, Estrada Monumental 244-7^o Dto, Caixa 14, Funchal, Madeira, Portugalujo.

12- ĝis 15-jaraj lernantoj en Mozambiko deziras korespondi kun similaĝaj. Ankaŭ Esperanto-afiŝojn k.s. por ekspozicio atendas kontraŭ rekompenco s-ro M. Raposo, Caixa Postal 872, Lourenço Marques, Mozambiko.

Noveldonita turista prospekto en Esperanto okaze de la urba jubileo 1971. Petu senpage de: Turista Oficejo, Parkgatan 2, S-411 38 Gotenburgo, Svedio.

Mankas al mi kelkaj numeroj de la revuo "La juna vivo" de la jaroj 1940-50. Kiu povos helpi min? R. Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Unestene volas korespondi, precipe pri lingvistikaj temoj, Denis Le Cam, 101 Kensington Road, Kensington, Calif. 94707, Usono.

Universitatano, verkisto 43-jaraĝa, ŝatus korespondadi kun nekomplika, solvivanta sinjoro. Skribu al rekonilvorto DORIAN GRAY, ĉe Willimann, 53, av. d'Aïre, CH-1203 Genève.

Post la Inaŭguro, pikniku amase en bela londona parko! Kontakto: C. Fettes, St. Columba's College, Dublin 14, Irlando.

UNIVOX-kurso en Esperanto kaj 22 aliaj lingvoj nun vendiĝas en ĉiu kontinento. Petu informojn de INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

Universala Revuo kun adresaro "Esperanto Parolata": abonu aŭ petu specimenon (adreso en Jarlibro). Nova prezo 6,50 gld.

Internacia renkontiĝo (1-15 julio 1971) por kampaĉistoj, apud Mediteraneo. Informas Lentaigne, 3 av. Gaillarde, 34-Montpellier, Francujo, kontraŭ respondkuponon.

Nova numero de Bulteno kun poŝtkartoj por via korespondado kun Esperanto-lingvaj radiostacioj kaj aliaj estas mendebla. Prezo inkl. 20 pk: Skr 5,20 (8 rpk, 1,— us. dol., 3,60 gld.). INTER — Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio. Pĉk. 42 66 60-7.

Por militviktimoj en Bengalujo sendu monon, konserveblajn manĝaĵojn, medikamentojn, al Compass, 14 Khudiram Bose Road, Calcutta 6, Hindujo.

"Pedagogo interŝanĝus spertojn pri ludaj metodoj kaj iloj en la instruado de la historio", L. Tölgyesi, Györ, Arpad ut. 38/b, Hungarujo.

Poŝt-striko Britujo 1971: La privata poŝtservo Post-Haste uzis markojn kun teksto en L.I. Serio neuzita aŭ uzita sur koverto 4,20 GM + 0,50 GM (afranko). Diversaj E-poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj livereblaj. Neussner, D-1 Berlin 62, Dominicusstr. 40.

Praktikan kovrilon por via jarlibro de UEA vi povas mendi ĉe INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio. Pĉk. 42 66 60 -7. Prezo: Skr 2,60 (4 rpk., 0,50 us. dol., 1,80 gld.).

"Hodiaŭ, eĉ kleraj angloj ofte ne scias, ke iam ekzistis kornvala lingvo; ..." ("Esperanto" nov. 69). Mendu "Konciza historio pri la kornvala lingvo" ĉe via libroservo. 2,20 gld.

22-jara fraŭlo, komerc-laboristo, deziras korespondi kun japanaj gejunuloj pri diversaj temoj. Ivan Grabareviĉ, Bajski vinogradi 31, 24000-Subotica, Jugoslavio.

Filatelistoj! Freŝdata specialstampo de Kastelo de Turku kun speciala koverto kaj poŝtmarko. Nur tri respondkuponojn aŭ egalv. en poŝtmarkoj. Validas ĝis la fino de la jaro. Harri J. Melasniemi, Mikonkatu 4 C 67, SF-20100 Turku 10.

Radio Svedio baldaŭ havos tri novajn, fortegajn sendilojn por la mondaj programoj. Aktualigis disaŭdiĝojn en Esperanto. Proponu, skribu, reskribu al Radio Svedio, Progr. por la mondo, S-105 10 Stokholmo, Svedio. Ref.: INTER-grupo, Gotenburgo.



VOLE . . . NOVELE

Raymond Schwartz

Ĵus aperis ĉiuj noveloj de R.S. kolektitaj en bela libro. Ĝi estas unu el la plej brilaj manifestoj de Esperanto kiel literatura lingvo.

Limigita eldonkvanto.

Malhelruĝa artleđa bindo kun plasta polvokovrilo.
192 p. 50,— d. kr. (= 23,82 gld.) plus sendkosto.

Mendu ĉe via libroservo aŭ rekte de la eldonejo:

Eldonejo TK, Box 11, DK-2850 Nærum.
Dana poŝtĉekkonto 7 95 58
Germana poŝtĉekkonto Hamburg 36 17
Nederlanda poŝtĉekkonto 1806731
aŭ petu nin sendi poŝtrepage.



Ĉu vi jam legis?

IMPERATIVOJ DE LA VIVO de H. Rohden

Moderna filozofo en la moderna mondo. Li montras
la vojon al paco kaj feliĉo.

Ĉe Libroservo de UEA — 2,70 gld.

ATENTU!

ANTAŬ AŬ POST LA LONDONA KONGRESO

VIZITU KEIGHLEY-n,

*la naskiĝlokon de la
brita Esperanta movado kaj
mond-faman Brontë-an Distrikton.*

**LA KEIGHLEY-a ESPERANTA SOCIETO
BONVENIGOS VIN !**

Por broŝuro skribu al:

Town Clerk,
Town Hall,
Keighley,
Yorkshire,
Britujo.


**PROKSIMUME EKDE AŬGUSTO 1971
ESTOS BEZONATA**

LIBROTENISTO

por gvidado de la tuta librotenado de la Centra Oficejo en Rotterdam.

Dezirindaj kvalifikaĵoj: kapablo memstare kompili bilancon; sperto pri moderna librotena maŝino (ekz-e Adler Euconta); bona scio de Esperanto kaj laŭeble kono de la agado de UEA.

Skribu al: la direktoro de la Centra Oficejo de UEA,
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.



Librotena maŝino en la Centra Oficejo

Fondita en 1966

LA LINGUA INTERNAZIONALE

Iama "L'Araldo Esperantista" (1926) **ESPERANTO**

Fondinto-Redaktoro: Corrado Cerri-Calzoni

Itallingva poresperanta gazeto.

Formato cm. 32 x 44. 4-paĝa. 5-kolona.
Papero flavkolora. Verda inko. Presita.
Ilustrita. Trimonata. Absolute neŭtrala.

Ne estas fiksita abonkotizo. Ĝi estas sendata al tiuj personoj itallingvoparolantaj, kiuj faras oferon (valoron de unu paketo da cigaredoj) kaj interesiĝas pri la internacilingva problemo.

SENPAGE ĝi aperigas korespondajn anoncetojn de esperantistoj tutmondaj, kiuj deziras ekrilati kun "ital(in)oj". KOMPENSU aldonante "uzitajn poŝtmarkojn", kies valoro (antaŭ nuligoj) sufiĉu por afranko de registrita letero al eksterlando.

Adreso: LA LINGUA INTERNAZIONALE esperanto
(Direttore: Corrado Cerri-Calzoni)

Casella Postale 159, I-13051 BIELLA (VC)

Pĉk: Corrado Cerri, Direktoro LI-espo, n. 5-742,
I-13051 Biella (VC).

STAFETO pliriĉiĝas!

SENĜENAJ DIALOGOJ

de

Alberto Fernández

Fundamentaj demandoj el fiziko, biologio kaj evoluismo babile prezentitaj per lingvaĵo vigele-viva! Libroforma eldono de eĥa artikolserio aperinta en HOMO KAJ KOSMO. Enhavo plejparte reverkita kaj plikompletigita. Tutpaĝaj grafikaĵoj kaj klarigaj bildoj.

Formato: 15 x 22 cm.
200 pg.

Artpresa papero.
Prezo: broŝ. 12,50 gld.

Mendu ĉe UEA!

Eld. J. Régulo — La Laguna



Multaj volas, sed ... ne ĉiuj povas

fariĝi membroj (MA) de UEA por ricevi ĝiajn valorajn dokumentojn kaj esti en kontakto kun la internacia movado.

★ ★ ★ ★ ★

Eble vi povas helpi al unu el tiuj esperantistoj, kiuj ne havas eblon sendi la membrokotizon (pro transpagaj malfacilaĵoj).

★ ★ ★ ★ ★

Faru homon feliĉa, helpu samtempe al Esperanto, sendu la donacon de minimume 7,50 gld. al Fondaĵo Canuto de UEA. Vi povas indiki la nomon de persono, kiun vi volas membrigi. Se vi ne faras tion, la Centra Oficejo de UEA elektas personon, kiu estos membrigita per via donaco.

JEN PRAKTIKA AMIKECO TRANS LIMOJ!